# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

5
1975






Gaso sub Nia Regado (*ĉinstila pentraĵo*)

# Industria Fronto en Prospereco




La laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio laboras antaŭ la forno.






La laborista teori
grupo de la Popol
Presejo de Pekin
studas la verkoj
de Marks kaj Le
nin.




Nia geologia prospektora ŝipo "Prospektoro 1" funkcias sur la maro.


La laboristoj de l
Ŝanhaja Elektrmaŝin
Fabriko fabrikas va
porturbinan genera
toron kun kapacit
de 125,000 kilovato


La karbo de Datong-karbominejo de Ŝanhi-provinco estas transportata al diversaj loko






La laboristoj de la Hudong-a Ŝipkonstrua Fabriko mem fabrikis grandtipan tornomaŝinon, kiu povas unufoje fini prilaboradon de kranka instalajo de dizelo kun 12,000 ĉevalpovoj. Tio faciligis la pezan prilaboron.









La dekmil-tonela varŝipo "Fengming" fabrikita de la Ŝanhaja Ŝipkonstrua Fabriko estas lanĉita.



Granda nombro da traktoroj estos transportitaj al la kamparo.



Grupo el laboristoj, teknikistoj kaj kadroj kontrolas novajn produktaĵojn — grandtipajn ondumitajn ŝtaltubojn.

La laboristinoj de la Dandong-a Kemifibra Fabriko de Liaŭning-provinco kontrolas kvaliton de la produktaĵo.



ŜEN LI kaj ĜANG FANG:

# Ĉinaj Laboristoj Estas Mastroj de la Entrepreno

## —Pri la Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "la 7-a de Februaro" en Pekino

*"La plej granda dizela lokomotivo de hidraŭlika transmisio kun 6,000 ĉevalpovoj de nia lando estas jam produktata pogrande," jen estis la ĝojinda novaĵo, kiun ni aŭdis de la laboristoj de la Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "la 7-a de Februaro" en Pekino, kiam ni vizitis ĝin. Iu emerita laboristo emocie diris al ni: "Ni laboris ĉi tie jam kelkdek jarojn antaŭ la Liberiĝo kaj delonge en tiu tempo esperis propramane produkti lokomotivon por la patrolando, tamen nia espero ĉiam vaporiĝis fojo post fojo. Kial? Ĉar la fabriko estis en la manoj de la imperiistoj kaj burokrataj kapitalistoj. Nur post la Liberiĝo nia lokomotiva industrio ekhavis sian disvolviĝon, kaj hodiaŭ oni povas fabriki tian lokomotivon kun granda ĉevalpovo. Tion ni ŝuldas ja al la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ!"*

*La vorto de la maljuna laboristo vekis multajn rememorojn pri la pasintaj jaroj.*

*Ĉirkaŭ cent jarojn antaŭ la venko de la ĉina revolucio, en koluzio kun la ĉina reakcia regantaro la invadintaj imperiismaj fortoj ekspluatis minejojn, konstruis fervojojn kaj funkciigis fabrikojn por rabi la riĉaĵojn en Ĉinio. La nomita fabriko, antaŭe nomata Ĉanghindian-a Fervoja Fabriko kaj fondita de imperiistoj en la jaro 1901, estis ĝuste sekvaĵo de tio. Tamen, en la longa tempo antaŭ la Liberiĝo ĝi restis ĉiam nur simpla riparejo, kiu ĉiumonate riparis nur dekkelkajn vaporajn lokomotivojn.*

*Post naskiĝo de la nova Ĉinio la fabriko revenis en la manojn de la popolo. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la laboristoj fariĝis veraj mastroj de la ŝtato kaj la produkto rapide disvolviĝis. La laboristoj de la fabriko ne nur altigis sian laborefikecon en riparado je du-oblo kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo, sed ankaŭ sukcesis fabriki dizelan lokomotivon kun 600 ĉevalpovoj en 1958. Dum la Granda Proleta Kultura Revolucio, frakasinte la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki ili levis sian socialisman aktivecon kaj kreivon en konstruado, kaj produktis tiajn lokomotivojn kun 3,000 kaj 6,000 ĉevalpovoj, kiuj havas ĉinajn stilojn, atingas progresintan nivelon kaj produktiĝas per ĉinaj materialoj.*

*Kial la atingo de la mallongaj 25 jaroj superis tiun de kelkdek jaroj antaŭ la Liberiĝo? Kiel la laboristoj disvolvis siajn fortojn, mastrumas la fabrikon kaj transformis la malnovan kaj postiĝintan fabrikon en socialisman progresintan entreprenon? Kun tiuj demandoj ni turnis nin al la gvidantoj, laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko. Kaj el tio rezultiĝis la jenaj tri raportoj.*

# Liberiĝi Kiel Mastroj

EN analizo ĝis la fino la ŝanĝon de la nomita fabriko oni ŝuldas al tio, ke la venko de la ĉina revolucio ŝanĝis la posedsistemon kaj la politikan pozicion de la laboristoj, tiel ke ili, sklavoj en la malnova socio, fariĝis mastroj de la nova socio.

En la laborista kaj oficista klubo de la fabriko ni intervidiĝis kun emeritaj laboristoj Hang Baŭhua, Liu Zajhiang, Zuo Ŝigjun, Sun Maŭlin kaj aliaj, kiuj siatempe partoprenis en la fame konata granda Striko de "la 7-a de Februaro" en 1923, inter kiuj la plej aĝa nun havas 86 jarojn kaj la malplej aĝa jam 76 jarojn. Tamen ili ĉiuj estas fortikaj, parolemaj kaj bonhumoraj. Kun rideto Zuo Ŝigjun diris al ni: "Ne trompiĝu pro mia aĝo, mi ne havas rilatojn kun malsanoj. Tio estas rezulto de kelkdekjara hardiĝo en peniga laborado. Nun la tagoj estas feliĉaj por ni, tiel ke ni maljunuloj preskaŭ rejuniĝis."

La respondeculo pri la emeritaj laboristoj informis nin, ke la fabriko nun havas 600 emeritajn laboristojn, inter kiuj 120 persone partoprenis en la Striko de "la 7-a de Februaro". Plejparto de ili loĝas en ĉirkaŭaĵo de Ĉanghindian. Kvankam ili emeritiĝis, tamen la fabriko tre respek-

*La partia komitato de la fabriko en kunveno*



tas kaj prizorgas ilin. Oni ĝustatempe komunikas al ili dokumentojn de la Partio kaj registaro, kaj raportas ĉiutrimestre al ili pri la stato de la fabriko kaj petas de ili admonojn; kaj estas speciale fondita sanitarejo por la pensiuloj krom la hospitalo por laboristoj kaj oficistoj. Tion oni eĉ ne sonĝis en la malnova socio. Por esprimi sian dankon al la zorgemo de la Partio kaj registaro, la maljunuloj sin organizis por laŭeble fari ion utilan por la revolucio. Ekzemple, ili ofte iris al fabrikoj, oficejoj kaj lernejoj fari raportojn por ke la junuloj sciu kaj firme memoru la suferojn de la laboranta popolo en la malnova socio, varme amu la hodiaŭan feliĉan vivon, diligente lernu kaj laboru por bone konstrui la grandan socialisman patrolandon.

Je mencio de la malnova socio la maljunuloj havis multon por diri. Tiam sub la kruela subpremado kaj ekspluatado de la ĉinaj militaristoj, burokrata burĝaro kaj fremdlandaj imperiistoj la ĉina laboristaro troviĝis en profunda mizero. Ili devis vendi siajn laborfortojn al la kapitalistoj, tamen en la fino restis al ili nur du malplenaj manoj, kaj tutjare ili ne povis sate manĝi nek varme sin vesti. Estis ankoraŭ pli netolereble, ke la kapitalistoj kaj laborestroj de la fabriko senbride limigis kaj atencis ilian personan liberecon kaj homajn rajtojn. Ili havis por si eĉ apartan enirejon disde la laboristoj, kiuj devis levi siajn manojn por akcepti korpotraserĉon, elirante el la fabriko.

La laboristoj ne povis toleri tian vivon kaj senĉese leviĝis por kontraŭbatali. Post la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio en 1921, ĝi komencis organizi kaj gvidi la laboristojn kaj kamparanojn al batalo. La nomita striko estis ĝuste senprecedence granda batalo farita, sub la gvido de la Partio, de la laboristoj de la fabriko kune kun tiuj de Ĝengĝoŭ kaj Hankoŭ kontraŭ la militaristo Vu Pejfu, kiu malhelpis la fondiĝon de la ĝenerala sindikato de fervojistoj de la Pekino-Hankoŭ-a Fervojo. Ĝi manifestis la revolucian spiriton de la laboristoj de Ĉinio, kiuj timis nek perfortaĵojn, nek sinoferon kaj brave batalis en unuiĝo. Kvankam la striko estis subpremita de la reakciuloj, tamen ĝi semis ĉie revoluciajn fajrerojn. La laboristoj neflekseble persistis en batalado kaj akiris kompletan liberiĝon nur kiam la Ĉina Popola Liberiga Armeo liberigis Ĉanghindian kaj prenis la fabrikon sub sian kontrolon en la jarfino de 1948.



*Antaŭ la Liberiĝo la fabriko havis nur 19 laboristinojn, sed nun jam ĉ. 2,000. Jen laboristinoj de la grupo "la Oka de Marto" de la lokomotivoripara laborejo.*

En bataloj aperis sennombraj aktivuloj el laboristoj. Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"Oni nepre devas tutkore sin apogi sur la laborista klaso"**, la partia organizo de la fabriko elektis avangardajn elementojn de la laboristoj por plenumi gvidajn laborojn en diversaj fakoj. Ĉar ili konis produktadon, havis intiman rilaton kun la amasoj kaj precipe posedis altan klasan konscion kaj decidan volon por ŝanĝi postiĝintan fizionomion de Ĉinio, kaj ili rapide fariĝis la ĉefaj fortoj gvidantaj la fabrikon.

Nun la laborantoj de la fabriko jam multiĝis de 3,000 ĝis 9,000 kaj ankaŭ ĝia gvidantaro fortiĝis, kies konsisto ĉiam tenas la superecon de laboristoj. Tiel estas senescepte en la sindikato — la amasa organizo de la laboristaro, la komitato de la Junulara Ligo — organizo de la avangardaj junuloj kiel en la partia komitato kaj revolucia komitato de la fabriko. En laborejoj preskaŭ ĉiuj gvidantaj kadroj estas laboristodevenaj.


Dank' al la hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio la kadraro de la fabriko plie altigis sian konscion pri batalo inter la du klasoj kaj du linioj, pliprofunde komprenis la gravan signifon de persisto en la socialisma direkto kaj firmigo de la proleta diktaturo kaj ankoraŭ pli konscie lernas kaj laboras. Laboristoj diris: "Kun tiaj kadroj kiel nia gvidantaro ni havas pli da certeco."

Ili rakontis al ni pri vicsekretario de la partia komitato de la fabriko Gaŭ Ŝulan.

Ŝi estis gasveldistino kaj aĝas 33 jarojn. Antaŭ la granda kultura revolucio ŝi estis malmulte konata en la fabriko. Tamen ŝi laboris diligente timante nek malfacilon nek penadon, amis kolektivon kaj zorgis pri aliaj, pro kio ŝi ofte estis laŭdata de la majstro kaj laboristoj de la laborejo. En la granda kultura revolucio ŝi kuraĝis persisti en vero kaj batalo kaj protektis la interesojn de la revolucio. Kune kun la vastaj amasoj de la laboristoj kaj kadroj ŝi profunde kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, kiu foje malbone influis la fabrikon.

Dank' al la amasa revolucia kritiko la kadroj kaj laboristoj ĝenerale levis sian kapablon distingi la ĝustan linion disde la eraran kaj altigis sian konscion pri plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En la batalado Gaŭ Ŝulan glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis promocita kiel estro de la laborejo en la jaro 1969 kaj membro de la partia komitato de la fabriko en 1970.

*Laboristoj kaj teknikistoj de la dizellaborejo kune faras projektadon.*



*Emerita laboristo Zuo Ŝigjun lernigas al junulo teknikon.*



Kiam ni intervidiĝis kun ŝi, ŝi estis blankiganta muron en korto de la oficejo de la partia komitato kune kun ĝiaj aliaj membroj. Ŝi diris al ni, ke antaŭe ĉi tie estis loĝejo de la burokrataj kapitalistoj en kiun la laboristoj estis malpermesitaj eniri. Nun ĉi tie estas sidejo de la partia komitato kaj ĝiaj subaj organizoj, kaj ĝia pordo estas ĉiam malfermita al la laboristoj.

Por teni intimajn rilatojn kun la amasoj kaj ricevi helpojn kaj kontrolon de la laboristoj kaj preventi burokratismon kaj reviziismon, la partia komitato kaj revolucia komitato speciale ellaboris regulojn, ekzemple la membroj de la gvidantaro devas partopreni en fizika laboro minimume duontagon en ĉiu semajno krom regule du monatojn ĉiujare en la laborejo; por la kadroj de laborejoj la tempo estas ankoraŭ pli longa. Ĉiujare ĝi faras "reĝustigon de laborstilo kun malfermita pordo", t.e. gvidantaj kadroj de la fabriko iras al laborejoj kaj sekcioj por aŭskulti kritikojn de la laboristoj al la partia komitato kaj revolucia komitato kaj plibonigi la laborojn. En ordinaraj tempoj oni povas malkovri kaj kritiki mankojn de laboroj per diversaj formoj kiel dazibaŭo k.a.

En la pasinta vintro okazis jena afero: Kiam iu laborejo translokiĝis, forgesante malmunti la akvotubon, tiel ke ĝi kreviĝis pro frosto kaj la akvo ellasita amasiĝis kaj malsekigis maŝinpartojn. Vidinte tion, iu akvotuba laboristo skribis dazibaŭon por kritiki la koncernatojn kaj ankaŭ la partian komitaton pro tio, ke ĝi ne profundiĝis inter amasojn kaj ne ĝustatempe solvis tiun problemon. Leginte ĝin vicsekretario de la partia komitato kaj veterana kadro Gin Jaŭnan tuj rapidis al la loko kaj kunvokis tien la koncernajn kadrojn. Li aprobis kaj laŭdis la revolucian spiriton de la laboristo, kiu estis respondecema al laboro kaj kuraĝis malkovri problemon, kaj faris memkritikon pri la laboro de la partia komitato. La akvotubo estis tuj malmuntita. Vidante ke la gvidantoj tiel atentas iliajn opiniojn, la laboristoj pli volonte eldiras sian opinion, se ili havas ion ajn en la koro.

"En grandaj entreprenoj kiel la nia, la gvidantaj kadroj havas multajn laborojn por fari. Tamen la praktiko diras al ni, ke se nur ni prenas la revoluciajn teoriojn de marksismo kaj leninismo kiel orientilon kaj firme nin apogas sur la laborista amaso, ni povas bone teni la socialisman direkton de entrepreno kaj bone fari niajn laborojn. Alie, ni eble perdus la direkton." Tio estis komuna sperto de multaj kadroj, kiujn ni vizitis. Pri tio vicestro de la revolucia komitato kaj konstanta membro de la partia komitato de la fabriko Jin Diange havas pli profundan komprenon. Antaŭ la kultura revolucio li jam estis vicestro de la fabriko. Tiam li praktikis la reviziisman linion de administrado de entrepreno pro tio, ke li ne tiel atentis studon de la revoluciaj teorioj kaj malalta estis lia kapablo distingi la ĝustan linion disde la erara. En la granda kultura revolucio la kritiko de la laboristoj al la erara linio multe edukis lin. En la batalado li intensigis sian studadon kaj senĉese altigis sian konscion pri plenumado de la fundamenta linio de la Partio en la socialisma historia periodo. En laboroj li persistas pri la komando de proleta politiko, kredante al kaj sin apogante sur la laboristaj amasoj. Li ofte profundiĝis en laborejojn por partopreni en produkta laborado kaj informiĝo pri la stato de la laboro kaj samtempe direktis la produktadon kaj pro tio li ricevis bonan akcepton ĉe la laboristoj.

La partia komitato kaj revolucia komitato disponigas al si tempon por lerni verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ. Krome ili ankaŭ elpremis certan tempon por memstudi. Iam ili ankaŭ iris al laborejoj kaj sekcioj por kune kun laboristoj studi marksismon kaj kritiki la reviziisman linion de Lin Biaŭ kaj malnovajn tradiciajn konceptojn de la ekspluata klaso kun Konfucio kiel reprezentanto, kaj por kune administri bone la fabrikon.

# Demokratia Administrado

LA aparta impreso, kiun ni ricevis dum vizitado al la Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "la 7-a de Februaro", estas tio ke la vastaj laboristaj amasoj rekte partoprenas en la decidoj pri la grandaj aferoj de la fabriko kaj en la ellaborado de la plano kaj regularoj kaj konkure prenas sur sin la pli pezajn labortaskojn.

La unua grava afero en la produkto en la jaro estas mobilizi la laboristaron por diskuti la jaran planon. En la jarkomenco la partia komitato kaj la revolucia komitato de la fabriko informas al la laboristaro pri la stato de plenumado de la produktoplano de la pasinta jaro kaj la produktotasko de la nova por ke ĉiuj laborejoj diskutu ilin. Poste la nomitaj komitatoj ensorbis la ĝustajn opiniojn por finpretigi la jaran planon.

Kio bona troviĝas en tia agmaniero? Ni prenu la produktan planon de 1974 kiel ekzemplon: En la komenco la fabrika estraro difinis la taskon de riparo de 285 vaporaj lokomotivoj en la tuta jaro, sed post la diskutado de la laboristoj la celita cifero altiĝis ĝis 300. Tiu nombro konformis al la realo kaj povis movi aktivecon de la laboristoj. Rezulte, en tiu jaro oni riparis 23 lokomotivojn pli multe ol la unua plano.

La formoj de partopreno en administrado fare de la laboristoj estas tre variaj. En la laborejoj, ĉiuj grupoj, krom siaj estroj, havas ankaŭ demokratiajn administrantojn,

*La teoria grupo de muldlaborejo en lernado*




kiuj helpas en administrado. "Ĉu apogiĝi aŭ ne al la laboristaj amasoj, la' rezulto estas tute alia." La laborejestro de metalaj kunmetaĵoj Kju Venŝu rakontis al ni jenan ekzemplon:

En la fino de la jaro 1973, kiam la fabriko preparis sin por produkti dizelajn lokomotivojn, la laborejo estis taskita produkti pli ol okdek specialajn ekipaĵojn. Tiu aldona tasko estis sufiĉe peza, ke la funkciuloj de la laborejo sentis malfacilon por distribui la laborojn kaj kunvokis la grup-estrojn por interkonsiliĝi pri la afero. La estroj, kiuj estis laboristoj demokratie elektitaj **kaj** ne forlasis sian antaŭan laboron, bone scias pri la laborstato de sia grupo. Post diskuto, ili opiniis ke la tasko, kvankam peza, estas plenumebla post plena mobilizo de la amasoj, kaj tuj dividis inter si la taskon plenumendan. En la grupoj oni organizis sturmtaĉmentojn kaj elpremis tempon por plenumi la aldonan taskon. Post kvar monatoj, t.e. duono de la difinita tempo, oni plenumis la taskon krom plenumo de la kutima ĉiutaga laboro. "Tio montris ke la amaso estas vera heroo," diris la laborejestro.

Ni vizitis la dekan grupon de la nomita laborejo. Kiel ĉiuj aliaj grupoj de la fabriko, ĝi havas demokratiajn administrantojn, kiuj respektive sin okupas pri politiko-propagando, sekureco kaj kvalito, kontrolo de deĵorĉeesto kaj materialo. Ili ĉiuj estas laboristoj neforlasantaj sian ĉiutagan laboron. Ni vidis murgazeton de la grupo, sur kiu estis artikoloj pri komprenaĵo en lernado de politika teorio kaj kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj informoj pri bonaj homoj kaj bonaj aferoj, tio estis aranĝita sub la zorgo de la administranto de politiko-propagando. Sur ĝi estis publikigita ankaŭ produkta situacio, tio koncernis tiun de sekureco kaj kvalito. La publikigo celis laŭdi la avangardojn por akceli la produkton. Estas videble, ke kun tiuj demokratiaj administrantoj la laboroj de la grupo estas pli bone kaj vigle faritaj.



*Kadro (maldekstre) kaj laboristo en laborado.*



*Dizelo en prova funkciado*

Kun intereso ni rigardis ankaŭ la propran tenejon de materialoj de ilia valva grupo. En ĉambro kun planko de dek kvadrataj metroj estis nete metitaj plej diversaj objektoj, kiel feraj kaj kupraj tuboj, ŝraŭbingoj, kaŭĉukaj pecoj ktp. Laboristo kun aĝo de proksimume 60 jaroj ĝin prizorgis.


Li montris al ni mallongan kupran tubon dirante: "Tiu estas stumpo restanta post foruzo de ĝia granda parto de frata laborejo ne plu uzebla por ĝi, sed ankoraŭ uzebla por ni per kunveldo. Ni mem administras la fabrikon kaj devas atenti pri ŝparemo kiel decas vera mastro." De du jaroj li kaj aliaj samgrupanoj kolektis neuzeblajn postrestaĵojn kaj ŝparis por la ŝtato pli ol 1,800 metrojn da bona kupra tubo. Iafoje okazis ke ili produktis ion ne bezonante ricevi tiun aŭ alian materialon.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri partopreno de la laboristoj en administrado de entreprenoj kaj reformado de la malraciaj reguloj, la partia komitato kaj la revolucia komitato de la fabriko paŝon post paŝo reformis malraciajn regulojn kiuj bremsis la aktivecon de laboristoj, dank' al mobilizo de la amasoj. En la jaro 1971 la laboristoj elmetis sume pli ol 40 milojn da opinioj en diversaj formoj, kiuj malkovris la kontraŭdirojn kun analizoj kaj reformaj proponoj.

Tiam estis starigitaj grupoj por reformo de malnovaj reguloj de la laborejo ĝis la nivelo de la fabriko. Ili koncentrigis kaj ordigis sisteme la prezentitajn opiniojn de la amasoj por ellabori formalajn proponojn, kiujn oni submetis al pridiskutado kaj reviziado de la amasoj kaj poste provis ilin en produkta praktikado.

"La regularoj post tiamaniera reformado estas pli simplaj, klaraj kaj pli raciaj," rimarkis la laboristoj.

Post la Liberiĝo, la fabriko tuj nuligis la barbarajn regulojn, per kiuj la kapitalistoj sklavigis la laboristojn, kaj komencis starigi novajn por protekti la interesojn de la laboristoj kaj akceli la disvolvadon de la produkto. Poste en ilia kompletigado kaj sistemigo, oni ne sufiĉe sin apogis sur la amasoj sed nur sur malmultaj koncernaj oficistoj kaj ignoris la resumadon kaj sorbadon de ĝustaj opinioj de laboristoj devenantaj de praktikado sub la influoj de la reviziisma linio. Rezulte de tio, multaj el la tiel ellaboritaj regularoj maladekvatis al la produkta realo kaj bremsis la aktivecon de la laboristoj. Nun tiuj malraciaj partoj estas nuligitaj, kaj la laboristoj konscie plenumas la novajn regularojn, en kiuj ili mem havas parton en ellaborado, kaj aperis tute novaj fenomenoj. Ekzemple, antaŭe en okazo de difekto de ekipaĵoj la koncerna laboristo devis punpagi, sed nun oni devas unue analizi la kaŭzojn de la difekto, kaj al la kulpinto de la kazo oni devas fari paciencan kaj delikatan edukon pensan por ke tiu ekhavu firman penson protekti la posedaĵojn de la ŝtato kaj senĉese fortigi sian devkonscion. Tiel la punpago estas nuligita, leviĝis la konscio de laboristoj, kaj reduktiĝis okazoj de akcidentoj; tio kreas favorajn kondiĉojn por disvolvi la produkton.



*Dizela lokomotivo de hidraŭlika transmisio kun 6,000 ĉevalpovoj*

# Reformi la Malnovan Fabrikon

LA Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "la 7-a de Februaro" sin dividas en du partojn nordan kaj sudan fabrikojn, kiuj distancas unu de la alia je kvar kilometroj. La norda fabriko riparas varvagonojn kaj la suda riparis antaŭe vaporajn lokomotivojn kaj nun sin pretigas por produkti dizelajn lokomotivojn. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la laboristoj de la tuta fabriko ne nur energie plenumis la produktajn taskojn asignitajn de la ŝtato, sed ankaŭ aktive faris teknikajn renovigojn, konstruis novajn ekipaĵojn, partoprenis en projektado kaj provfabrikado de novaj produktaĵoj, kaj per tio senĉese reformis la fizionomion de la malnova fabriko. La praktiko vivece pruvis, ke ili estas mastroj ankaŭ en tekniko.

En la lignoprilaborejo de la norda fabriko ni rigardis produktan linion projektitan kaj konstruitan de la laboristoj mem.

En unu fino de la linio krudaj lignaj tabuloj unu post alia fluas sur la linion. Ĉe manipulejoj de ĉiuj procedoj de la linio sidas po laboristo kiu premas elektrajn butonojn. Momenton poste la lignaj tabuloj jam trapasis la tutan linion longan je 80 metroj kaj fine estis bonorde amasigitaj per maŝino en la alia fino de la linio.

Kiel oni tion faris en la pasinteco? 38-jara laboristo Gia Guoki, la ĉefa projektanto de la produkta linio, kondukis nin al malnova segmaŝino kaj diris, ke tiam du homoj portis la lignan tabulon, unu puŝis ĝin en unu flanko de la maŝino dum alia tiris ĝin en la alia flanko. Post finsegado ili devis transporti la lignajn tabulojn sur rabotmaŝinon. Laŭ ilia kalkulo, laborante unu tagon unu laboristo piediris ĉirkaŭ dek kilometrojn. Montrante per fingro la kavojn sur la ligna planko ambaŭflanke de la segmaŝino kamarado Gia diris al ni: "Jen estas signo de nia piedirado."

Post la Liberiĝo, kvankam la fabriko estis jaron post jaro reformita, tamen ankoraŭ restis nombro da malnovaj ekipaĵoj kiaj en la lignoprilaborejo. Kiel komplete ŝanĝi tian staton? Ĉu atendi novajn ekipaĵojn de la ŝtato? La laboristoj diris: "Kion ni mem povos fari, tion ni ne petos de la ŝtato." La partia komitato de la fabriko senĉese mobilizis laboristojn por fari teknikan renovigon por ke oni liberigu sin el la peza korpolaboro. Ĝuste en tia cirkonstanco kamarado Gia elpensis projekton de la produkta linio.

Kvankam la projekto estis ankoraŭ neperfekta, tamen ĝi montris la deziron de la laboristoj kaj altiris atenton de la partia filio de la laborejo, kiu organizis laboristojn kaj teknikistojn por kompletigi ĝin kaj mobilizis poste ĉiujn laboristojn kaj oficistojn de la laborejo por efektivigi ĝin en praktiko.

La funkciado de la produkta linio en pli ol unu jaro ne nur ŝparis laborfortojn kaj altigis laborefikon, sed ankaŭ multe reduktis laborintensecon de la laboristoj.

La supre menciita laborejo estas nur unu ekzemplo. En aliaj laborejoj de la fabriko ni vidis ankaŭ multajn maŝinojn projektitajn kaj fabrikitajn de la laboristoj mem. Iu respondeculo de la fabriko diris al ni, ke nur post la granda kultura revolucio de 1966 la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko sukcese efektivigis pli ol 5,000 teknikajn renovigojn. La ekipaĵoj de ili mem fabrikitaj sin nombras je unu-oblo pli multe ol tiuj postlasitaj de 48 jaroj antaŭ la Liberiĝo. En la historio de la fabriko oni registris, ke kiam la imperiistoj komencis funkciigi tiun fabrikon, ne nur maŝinoj estis importitaj de fremdaj landoj, sed ankaŭ martelo, tenajlo, segilo, rabotilo k.a. ne estis

produktitaj de Ĉinio. Tiam kiel ajn postiĝintaj estis la ekipaĵoj kaj malbonaj la laborkondiĉoj, la laboristoj ne rajtis reformi eĉ unu akcesoraĵon por ne paroli pri teknika renovigo kaj produkto de ekipaĵoj.

En la lasta duono de la kuranta jaro la fabriko komencos pogrande produkti dizelajn lokomotivojn, kio finos la historion de riparo de vaporaj lokomotivoj dum kelkdek jaroj. Tio plene manifestas saĝon kaj fortojn de la laboristoj.

Parolante pri tio la veterana laboristo Jan Fenggang, kiu partoprenis en projektado de la unua dizela lokomotivo kun 6,000 ĉevalpovoj, estis tre emociita.

Tiu dizela lokomotivo konsistanta el du dizeloj respektive kun 3,000 ĉevalpovoj estis projektita komence de la jarfino de 1968. Tiam kamarado Jan estis unu el la respondeculoj de la projekta grupo de la nova dizela lokomotivo kun 3,000 ĉevalpovoj. En la malnova Ĉinio li ne havis ŝancon viziti lernejon kaj en sia juneco partoprenis en la revolucio. Por liberigi la patrujon li militadis tra la lando, kaj poste estis transpostenigita al la industria fronto. Tamen li ne estas specialisto en tiu fako, kaj nur riparis dizelajn lokomotivojn en dekkelkaj jaroj. Ankaŭ la plejparto de aliaj 81 membroj de la projekta grupo, kiu konsistas el laboristoj, teknikistoj kaj gvidantaj kadroj, neniam faris projektan laboron, sed ili kuraĝis krei novon. Ĝuste ili prenis sur sin la pezan ŝarĝon de projektado de la dizela lokomotivo.

Kamarado Jan diris al ni, ke en tiuj tagoj la projekta ĉambro estis nekvieta dum tagnoktoj. Maljunaj laboristoj ne scipovis desegni, ili do kun okulvitroj faris modelon per kartono kaj mastiko por klarigi al la teknikistoj siajn proponojn pri la projektado. Ankaŭ la teknikistoj decidis ŝanĝi sian laborstilon sin apartigi de praktiko kaj modeste aŭskultis opiniojn de la laboristoj. Tiamaniere ili ofte laboris ĝis profunda nokto kaj iafoje gvidantoj ne povis ne devigi ilin ripozi per malŝalto de elektrolampo.

De kie venis ilia forto? La laboristoj diris: "La socialisma konstruado de nia lando prospere disvolviĝas, tamen sur la fervojoj ankoraŭ kuras postiĝintaj vaporaj lokomotivoj, kiel ni povas trankviliĝi!" Antaŭ la granda kultura revolucio la laboristoj jam proponis projekti kaj provfabriki dizelan lokomotivon kun granda ĉevalpovo. Tamen influite de la reviziisma linio de Liu

*Emerita laboristo, kiu persone partoprenis en la Striko de "la 7-a de Februaro", rakontas al infanoj pri la revolucia tradicio.*



*Laboristo Ĝang Lianjing (la dua de dekstre) de la fabriko studas problemon pri la eduka reformo kune kun instruistoj kaj studentoj.*



Ŝaŭki, la laboro de la projektado estis asignita nur al malmultaj teknikistoj kaj fine malsukcesis pro apartiĝo de la praktiko. En la granda kultura revolucio, laboristoj frakasis tiun eraran linion, kaj rekte partoprenis en la projektado kun decido rapide realigi la multjaran deziron.

Ili samtempe lernis kaj projektis, kaj plenumis la projekton de la ĉefa parto de la nova dizela lokomotivo en 25 tagoj. Post dek monatoj la lokomotivo kun 3,000 ĉevalpovoj estis provfabrikita. Tiu ĝojiga novaĵo rapide disvastiĝis inter amasoj.

Ĝojiga afero aperis ankaŭ en projektado kaj provfabrikado de hidraŭlika transmisia dizela lokomotivo kun 6,000 ĉevalpovoj. Ĉi tie ni rakontu pri farado de ekstera ringo de dentumita ŝafto.

Ekstera ringo de dentumita ŝafto estas unu el la ŝlosilaj aparatoj por transmisii povon de dizela lokomotivo. Ĝi estas farita per granda tirtranĉilo. La lokomotivo kun grandaj ĉevalpovoj postulas grandan eksteran ringon de dentumita ŝafto kun alta precizeco. Por ĝin prilabori oni devas havi tirtranĉan maŝinon kun tirforto de 100 tunoj.

La fabriko, kiu antaŭe okupis sin nur pri riparo de vaporaj lokomotivoj, ne havis tian ekipaĵon. Se oni petos helpon de aliaj fabrikoj, tio bezonos tempon de kelkaj monatoj. Kion fari? Arde diskutis la laboristoj de la lokomotivoripara laborejo. Iuj diris: "Anstataŭe ni uzu lokomotivon, ĉar ĝi havas grandan trenforton!" Aliaj diris: "La moviĝanta gruo povas levi grandan maŝinparton je kelkdek tunoj pezan, kial ni ne uzu ĝin por tiri la ringon?" Kelkdek proponoj estis elmetitaj. Sed ankaŭ iuj diris, ke tio simple estas ŝerco. La partia filio diskutis pri ĉiuj proponoj de la laboristoj kaj opiniis, ke estas ebla anstataŭigo de tirtranĉa maŝino per moviĝanta gruo kaj tio ankaŭ konformas al la spirito de sinapogo sur propraj fortoj.

Komenciĝis la laboro. Por pligrandigi tirforton, oni aldonis du vinĉojn por ke ili kunlaboru kun la gruo. En tiu tago svarmis homoj en la laborejo. Je fajfado la moviĝanta gruo kaj vinĉoj ekfunkciiĝis harmonie kaj leviĝis la tirtranĉilego. Post ĉirkaŭ 55 sekundoj la tranĉilego eltiriĝis. Oni nereteneble ekhurais. La ekzameno montris ke precizeco de la ringo atingis la normon de la projektado. Nun la laboristoj jam uzas la cent-tunan tirtranĉan maŝinon memfabrikitan.

La dizeloj kun 3,000 ĉevalpovoj estis provfabrikitaj unu post alia kaj ĝiaj lokomotivoj komencis prove veturadi. Kamarado Jan, kiu respondecas nun pri eksperimenta stacio de dizela lokomotivo, ĝoje diris al ni, ke en la pasinta jaro oni faris diversajn rigorajn ekzamenojn al la naŭa dizela lokomotivo kun 3,000 ĉevalpovoj dum 820 horoj, kaj determino diras, ke ĉiuj ĝiaj teknikoj atingis normojn de la projekto, kaj nun oni jam oficiale decidis pogrande produkti ĝin.


La ĝojiga novaĵo entuziasmigis la laboristojn kaj oficistojn de la fabriko. Ĉiu el ili volas kontribui al plirapida efektivigo de fervoja transportado de nia lando per dizela lokomotivo. Por produkti precizan oleŝprucigilon, la laboristoj de iu laborejo ne nur faris nombron da specialaj ekipaĵoj, kiuj ebligis al la kvalito de la ŝprucigilo atingi avangardan nivelon, sed ankaŭ konstruis novan domon, kiu povas konservi stabilan temperaturon kaj rezisti polvon kaj per tio garantiis la bezonon por grandkvante produkti oleŝprucigilojn. Ankoraŭ pli multaj laboristoj diligente studas teoriojn en la kurso de dizela lokomotivo funkciigata de la fabriko por posedi la novan teknikon.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ diris: **"Oni neniam vidis, ke la popolamasoj estas tiel viglecplenaj, fervoraj kaj entuziasmaj kiel nun."** En la nomita fabriko ni vidis ĝuste tiajn homojn, kiuj nun energie konstruas per la spirito de mastroj la belan estontecon de la socialisma patrolando.

HIANG JONG:

# La Unua Oleodukto de Ĉinio

*Meti oletubojn en frosto*




EN nia lando jam konstruiĝis la unua oleodukto je 1,152 kilometroj longa, kondukanta de Daking-petrolkampo ĝis Kinhuangdaŭ, sude de Ŝanhajguan-pasejo de la Granda Muro. La konstruado de tiu "subtera aorto" komenciĝis en vintro de 1970 kaj finiĝis en 1973. En la pasinteco, la nafto de la petrolkampo estis transportata de cisternovagonaroj. De la Granda Proleta Kultura Revolucio, oble kreskis la produktokvanto de nafto de Daking-petrolkampo, por transporti oleon la fervojo jam pli kaj pli ne taŭgis. Hodiaŭ, laŭ tiu grandkalibra "subtera aorto" la nafto de Daking senĉese fluas tra Ŝanhajguan-pasejo en Kinhuangdaŭ, kaj poste de tie oni transportas ĝin per ŝipoj aŭ vagonoj al ĉiuj anguloj de nia lando. Tiu oleodukto ludos gravan rolon en pluapaŝa ekspluatado de Daking-petrolkampo kaj disvolvado de nia socialisma ekonomia konstruado.

Antaŭ nelonge, ni faris viziton al tiu oleodukto. La laboristoj kaj kadroj, partoprenintaj en tiu konstruado, rakontis al ni, kiel ili konstruis siatempe la oleodukton laŭ la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj.

## DISVOLVI AMASAN SAĜON KAJ KOLEKTIVAN FORTON

En iu pumpstacio de la oleodukto, ni legis artikolon kun la titolo de "Estas Ne Mito" en "Konstrueja Heroldo" siatempe eldonitan. Ĝi rakontas: Frumatene iu maljuna ŝafisto iris paŝti ŝafaron kiel kutime sur la vasta dezertejo kiun li frekventis antaŭe, lin tamen surprizis miraklo, ke aperis tie en unu nokto sufiĉe granda konstruaĵo.




*Ĝeto de Kinhuangdaŭ-haveno por petrol-transporto*

Tio estas ne mito, sed vera fakto. Por kiel eble plej frue starigi pumpstacion sur la dezertejo, la konstrua brigado tuj ĵetis sin al la konstruado vespere, atinginte tiun lokon. Ne sufiĉis tamen al ĝi laborfortoj. Pri tio informiĝinte pli ol cent komunumanoj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj rapidis por ĝin helpi. En frosto oni bezonis varman akvon por prepari morteron. La vilaĝanoj ĉiuj ekagis. Ili kuiris akvon kaj ĝustatempe portis ĝin al la konstruejo. La laboristoj kaj komunumanoj kune metis la fundamenton, masonis murojn, instalis pordon, fenestrojn kaj tegmenton. Kaj je la tagiĝo, post naŭhora laboro, ili finis la konstruadon de la pumpstacio.

La oleodukto konstruiĝis sub la helpo de armeanoj kaj popolanoj de la provincoj Hejlonggiang, Gilin, Liaŭning kaj Hebej, kiujn ĝi trapasas.

Por enterigi la oleotubojn, oni devis fosi profundan tranĉeon sur granda areo de kampo. Kaj la tempo estis mallonga, la tasko peza, ĉar oni devis plenumi ĝin post aŭtuna rikolto sed antaŭ glaciiĝo de tertavolo por eviti damaĝon al agrikultura produktado. Kion fari? La lokaj partiaj komitatoj kaj revoluciaj komitatoj propagandis al kamparanoj la signifon de konstruado de la oleodukto por la nacia ekonomio, kaj la lastaj konkure sin anoncis por partopreni en la fosado. Ankaŭ la komandantoj kaj batalantoj de lokaj garnizonoj entuziasme sin ĵetis en tiun laboron.

Oni antaŭkalkulis, ke la fosado de tiel longa tranĉeo bezonas kelkcent mil homojn en du monatoj. Sed, dank' al la forta subteno kaj arda entuziasmo de la kvar-provincaj armeanoj kaj popolanoj, la fosado uzis nur malpli ol duonon de la laborfortoj kaj tempo antaŭkalkulitaj.

En konstruado de la oleodukto la viglecplena trupo de teknikaj laboristoj servis kiel spina forto. Ni vizitis la Duan Inĝenieradan Sekcion. Ties laboristoj kaj oficistoj venis de pli ol 20 provincoj de nia lando kaj jam batalis en multaj lokoj por disvolvi nian petrolan industrion. En vintra konstruado de la oleodukto, ili laboris ofte sur neĝo kaj glacio. Por veldi tubojn, ili iam devis kuŝi sur glacio, kaj fininte la veldon, ili rimarkis, ke la bluzo jam gluiĝis al glacio kaj neĝo. Venis printempo kaj sekvis furioza sablovento. Kiam oni prenis manĝon, sableroj de tempo al tempo saltis en manĝbovlon. Tamen la peniga vivo ne timigis la laboristojn, ili diris poezie: "Plezure ja kuŝi en tendo ĉiela sur tero, bongustas eĉ manĝo miksita per flavaj sableroj."



*Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj studas konstruan projekton.*

Ĝuste tiuj ordinaraj tamen grandaj laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj plenumis, per siaj manoj, la konstuadon de la oleodukto.

Prezidanto Maŭ diris: **"El ĉiuj aferoj en la mondo, homo estas la plej valora. Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homoj, ĉiaj mirakloj povas esti kreitaj."** En konstruado de nia patrujo, ni nin apogas sur la propraj fortoj, sur la saĝo kaj kreivo de milionoj kaj milionoj da popolanoj.

## SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ

Por konstrui tiel longan oleodukton, estis bezonataj preskaŭ 200 mil tunoj da grandkalibraj ŝtaltuboj. Tiam nia produktado de tiaj ŝtaltuboj ne povis kontentigi la bezonon. La ŝtato asignis la taskojn produkti tubfarajn maŝinojn kaj starigi ŝtaltubajn fabrikojn al la provincoj Liaŭning, Gilin kaj Hejlonggiang.

La aferoj estas malfacilaj. Nur unu kompleto da tubfaraj maŝinoj konsistas el preskaŭ 20 grandtipaj ekipaĵoj, pli ol 2,000 kompletoj da lagroj kaj pli ol 70 generatoroj. Kaj samtempe starigi ses ŝtaltubajn fabrikojn en mallonga tempo ja estas pli malfacile.

La laboristoj kaj teknikistoj de la tri provincoj de nordorienta Ĉinio samtempe faris projektadon kaj konstruadon, rompante blindan kredon kaj liberigante la penson. Tri monatojn poste, la bezonataj ses kompletoj de tubfaraj maŝinoj estis fabrikitaj, kaj ses ŝtaltubaj fabrikoj estis starigitaj respektive en Dalian, Siping kaj aliaj lokoj. Post prov-funkciigo kaj reĝustigo en mallonga tempo, nombro kaj nombro da normaj ŝtaltuboj estis alportataj al la konstruejoj laŭlonge de la oleodukta linio.

Ni vizitis Siping-an Ŝtaltuban Fabrikon. Nin akceptis mezaĝa kadro Cong Pejheng, estro de ĝia revolucia komitato. Antaŭe li estis metala stablolaboristo.

Li rakontis al ni, kiel ekĝojis de emocio la laboristoj de Siping, informiĝinte pri konstruo de ŝtaltuba fabriko en la loko, kaj ili unuj post aliaj petis partopreni en la konstruado. Sub unueca aranĝo de koncerna supera instanco, koncentriĝis pli ol 500 laboristoj kiuj venis de pli ol 40 fabrikoj.

Ili starigis la fabrikon kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj. La fabriko sidis en la loko, kie antaŭe estis lignejo. Oni devis mem konstrui la fabrikdomojn. Ankaŭ la alportitaj ekipaĵoj devis esti muntitaj de ili mem. Iuj el la grandaj partoj de maŝinoj pezas je 7-8 tunoj. Ĉar la levmaŝinoj ne sufiĉis, oni instalis la maŝinojn portante ilin per manoj kaj ŝultroj. En tiuj tagoj, tagnokte aŭdiĝis bruoj de maŝinoj kaj voĉoj

de homoj en la fabriko. Por gajni tempon, multaj laboristoj ne revenis hejmen en multaj tagoj. Laciĝinte, ili faris dormeton ĉe maŝino. Tiel streĉa, peniga laboro eligis nenian grumblon ĉe la laboristoj kaj kadroj. Ili havis komunan volon "kiel eble plej rapide elfari oletubon por kontribui al transportado de nafto". Finfine ili ĝustatempe produktis normajn ŝtaltubojn.

En tiu fabriko ni vidis neniun fremdlandan ekipaĵon, kvankam iuj maŝinoj el eluzitaj ŝtalaĵoj aspektas ne tiel bele. Ankaŭ la fabrikdomoj estas ordinaraj. Kaj la oficejo de la gvidantoj de la fabriko sidas en malnova domo de la lignejo.

Tio tamen estas nenio grava. La malnova Ĉinio restigis al ni nur la bazon de "malriĉeco kaj blankeco". Ĝuste sur tiu bazo ni kondukas konstruadon de nulo al ekhavo, de malgrandeco al grandeco laŭ la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj. Inter la laboristoj de tiu fabriko, neniu sin okupis pri fabrikado de ŝtaltubo en la pasinteco. Ili diligente studis, plibonigis teknologion kaj kreis favorajn kondiĉojn. Ĉu nun ili ne starigis la fabrikon kaj produktis grandtipajn oletubojn kun totala longeco de 340 kilometroj? La laboristoj esprimis, ke en la estonteco, ili daŭrigos la penadon, senĉese plibonigos la laborkondiĉojn kaj altigos la produktan kaj teknologian nivelon por fabriki pli multe da ŝtaltuboj por la ŝtato.

## "AMASA KAMPANJO"


La oleodukto de Daking ĝis Kinhuangdaŭ devas trairi multajn montetojn, montojn, riverojn, fervojojn kaj ŝoseojn je pli ol kvincent fojoj. Tio kaŭzis gigantajn malfacilojn. La konstruantoj ĉiamaniere plenumis la taskojn instali trairajn oletubojn, disvolvante la revolucian spiriton de Daking-anoj kuraĝi batali kaj esti lerta en batalo. Ni prenu kiel ekzemplon la taskon instali oleodukton tra Nengiang-rivero, unu el la ŝlosilaj laboroj. Ĝang Hongfej, vicestro de la Revolucia Komitato de Daking-petrolkampo, siatempe servis kiel ĝenerala komandanto de tiu laboro. Li rakontis al ni la tiaman batalon.

Nengiang-rivero larĝas je 400 metroj kaj profundas je 11 metroj. Por ĝustatempe elfluigi la nafton de Daking-petrolkampo, estis necese meti la oleodukton sub la fundon de la rivero antaŭ ĝia glaciiĝo en vintro de 1970.


Estis tre malfacile por la konstruantoj en teknologio meti tiel grandtipan oleodukton sub la riveron. Kiam ili ricevis la taskon, jam estis tria tagdeko de septembro kaj restis nur iom pli ol 40 tagoj ĝis rivero-glaciiĝo. Tio des pli intensigis la malfacilecon de la konstruado. Por ĝustatempe plenumi la taskon, la komandejo organizis "amasan kampanjon".

La "amasa kampanjo" estas apliko de la milita penso de Prezidanto Maŭ koncentrigi superan forton por doni al la malamiko eksterman baton en laboro

*Prepara laboro por meti oletubojn sub Nengiang-riveron*




*Unu el la pumpstacioj de la oleodukto*



de konstruado. Tio signifas, ke sub la unueca gvido de la Partio, koncentrigante homajn kaj materiajn fortojn de diversaj lokoj kaj profesioj oni rapide plenumas ŝlosilan konstruaĵon per batala maniero. En nia socialisma socio, troviĝas neniu konflikto kaj konkurenco inter entreprenoj, por ne paroli pri monopolo de patento aŭ ensekretigo de teknologio. Ĉiuj laboras por la komuna celo plirapidigi la socialisman konstruadon. Tio liveris eblecon por organizi tian "amasan kampanjon". Ĝuste per tiu rimedo oni konstruis siatempe la Daking-petrolkampon en mallonga tempo. Kaj de tiam tiu ĉi rimedo floradas sur diversaj konstruaj frontoj tra la lando.

En ĉifoja "amasa kampanjo" en Nengiang-rivero partoprenis pli ol du mil personoj, inkluzive teknikajn laboristojn, milicanojn en ĉirkaŭaj vilaĝoj, soldatojn de aera, mara kaj inĝenieradaj fortoj de ĈPLA kaj navigtransportistojn.

*Konstruejo de la olecisterno el antaŭpremita betono*



Por trovi la plej taŭgan punkton en la rivero, la aera forto ekspedis aeroplanon por mezuri terformon kaj elekti la trairejon de la oleodukto, dum la mara forto sendis skafandristan taĉmenton por koni la riverfundon. Kaj la inĝenieradaj armeanoj respondecis pri subakva eksplodigo. La laboristoj kaj milicanoj prenis sur sin la lutadon kaj fosadon de tranĉeo. La armeanoj kaj popolanoj kontinue batalis por antaŭdate plenumi la taskon. Veldisto Vang Diĉaŭ senripoze laboradis 42 horojn. Gvidantoj multfoje konsilis lin ripozi, li tamen diris: "Por fari revolucian aferon, oni ne devas kalkuli tempon. En la amasa kampanjo, mi ne devas ripozi antaŭ ol plenumi la batalan taskon!"

Kiam la subrivera tranĉeo estis fosita, la ŝtaltuboj estis kunvelditaj kaj ĉiuj preparaj laboroj estis finitaj, baldaŭ venos la decida momento por meti la oleodukton en la tranĉeon sub la rivero. Antaŭvespere de la streĉa batalo, la komandejo elmetis al ĉiuj konstruantoj la demandon: Kiaj akcidentoj probable okazos en metado de ŝtaltuboj sub la rivero? La lastaj faris varman diskutadon pri tio kaj levis 57 eble aperontajn problemojn, kaj prenis respondajn rimedojn por ilin solvi. Dank' al tio fine oni sukcesis en la metado.

Ankaŭ la tuta konstruado de la oleodukto estis plenumita en tiu "amasa kampanjo" kun partopreno de miloj kaj miloj da homoj. En tiuj streĉigaj tagnoktoj, sur la konstrua linio pli ol mil kilometrojn longa de ambaŭ bordoj de Nengiang-rivero en la nordo ĝis Ŝanhajguan-pasejo en la sudo, ĉie regas pompa bildo. La vastaj amasoj de konstruantoj esprimis: Kvankam ni ne havas sperton pri konstruado de longdistanca grandkalibra oleodukto, nek sufiĉajn maŝinojn en konstruado, tamen ni estas direktataj de la principoj de **"sendependeco kaj memdecido"** kaj **"sinapogo sur la propraj fortoj"** persone formulitaj de Prezidanto Maŭ, kaj ni havas la Daking-an laboristaron kiel nian eminentan ekzemplon. Ni nepre devas labori diligente kaj lerte por konstrui tiun oleodukton rapide kaj bone.

Kion ili diris, tion ili faris. Tiu oleodukto fine konstruiĝis antaŭvespere de la Nacia Tago, la unua de oktobro, 1973, post iom pli ol du jaroj. Oni diris al ni, ke dank' al la plena atento de konstrua kvalito kaj severa observo de la regularo fare de diversnivelaj komandejoj en la amasa kampanjo kaj la vastaj amasoj de konstruantoj, la oleodukto sukcesis funkcii post la unua provo. La pliolunujara transportado de nafto montras, ke la kvalito de konstruaĵo estas bona, la maŝinoj kaj pumpiloj funkcias normale kaj transportado de nafto iras en sekureco kaj stabileco.




## PRESKAŬ DEK MILIONOJ DA INTELEKTAJ JUNULOJ IRIS AL KAMPARO

En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio preskaŭ dek milionoj da intelektaj junuloj de nia lando iris al kamparo por tie sin hardi, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ Zedong. Diversnivelaj partiaj organizoj aplikis tiucele multajn konkretajn metodojn por intensigi edukon al tiuj junuloj. Nun pli ol kvardek mil direktantaj kadroj restas speciale en kamparo por prizorgi ilin. En multaj lokoj oni kreis favorajn kondiĉojn por tiuj junuloj en postlabora lernado. Ili aktivadas en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj jam fariĝis granda forto en la batalo de ideologia sfero. Samtempe ili sin reformas, senĉese progresante en tiuj bataloj. Laŭ statistiko de Tiangin, Interna Mongolio, Hejlonggiang kaj aliaj 11 provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj, pli ol sepdek mil intelektaj junuloj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol naŭcent mil aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj pli ol ducent mil estis promociitaj al gvidantaro de diversaj niveloj. Iuj elstaraj intelektaj junuloj estis elektitaj kiel membroj kaj alternaj membroj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj reprezentantoj de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso.

## MALGRANDA KOMBAJNO POR RIZRIKOLTO

La Agrikultura Maŝinfabriko de Tajhegubernio de Gianghi-provinco sukcesis post provado fabriki kunlabore kun koncernaj institutoj malgrandan kombajnon "Dongfeng-12", kontribuante per tio al mekanikigo de rizkampaj laboroj de suda Ĉinio.

Tiu maŝino povas labori en malgranda aŭ mezgranda parcelo da akvokampo kun kotaĵo profunda je 20 centimetroj. Ĝi estas facile manipulebla kaj stabila en funkciado kaj ĉiuhore povas rikolti ĉ. 0.15 hektaron da rizplantoj kun bona laborokvalito kaj malaltaj pocentoj de difektoj kaj rompo al la rikoltaĵo. Al ĝia bazo oni povas ankaŭ almunti aldonajn instrumentojn por fari plugadon, terenebenigon, fosadon ktp.

## PUMPILOJ KUN ALTA LEVDISTANCO KONSTRUITAJ EN GUJĜOŬ

En 1964 Gujĝoŭ-provinco disvastigis la uzadon de akvomovataj pumpiloj, akcelante irigaciadon en montregionoj. La ordinaraj pumpiloj de tiu tipo povas levi akvon nur ĝis la alteco de 60-70 metroj kaj por levi akvon al pli alta loko ili estas ne plu uzeblaj. Por solvi tiun problemon, koncerna gvida fako de la nomita provinco fondis grupon el unuoj de akvoutiligo, scienca esplorado kaj mekaniko por provfabriki pumpilon kun alta levpovo. Post profunda enketado la grupanoj sukcesis fabriki kune kun la komunumanoj du specojn de pumpiloj taŭgajn por granda kaj malgranda flukvantoj. La pumpiloj povas levi akvon maksimume ĝis 260 metroj kaj estas varme akceptataj de la kamparanoj en la montregionoj.

HAŬ ĴAN:

# Kreintoj de Miraklo

KIE loĝas homoj, tie troviĝas vojoj, kiuj estas paŝe eltretitaj de iliaj antaŭuloj aŭ de ili mem. Kaj, en malsamaj lokoj troviĝas malsamaj vojoj.

Ĉe la piedo de la Granda Muro, inter la Janŝanmontaro troviĝas iu montpinto alta je 900 metroj super la marnivelo, sur kiu vivas 197 familioj de popolkomunumanoj, kiuj loĝas dise sur 6 montfaldoj, organizitaj en produktan brigadon nomatan Daŝuva. La vojo, kiu kondukis de unu vilaĝo al alia en la brigado kaj, precipe, de la loko al la ebenejo Hingĉenzi, kie troviĝas la oficejo de la komunumo, estis tute eksterordinara. Ĝi estis ŝtonvojeto, pendanta sur la roka montpinto. Venintoj de aliaj lokoj, tuj ekĝemis ĉe la vido de tiu ŝtonvojeto. Se estis neeviteble suriri ĝin, do, ĉe la grimpado, oni devis malrapide paŝeti, kroĉante la manojn firme al roko, kaj descendante, oni devis sidi sur la vojeto por atenteme glitetigi iom post iom sian postaĵon. Rememorante tion poste, oni ankoraŭ ne povis sin deteni de ĝemado: "Efektive danĝere!" Tamen, la afero estis tute alia por la Daŝuva-anoj. Dum paŝado sur tiu ŝtonvojeto, kvankam same atentemaj, ili estis tamen ankaŭ lertaj. Eĉ azenoj estis trejnitaj iri sur la vojeto, kun mallevita kapo kaj larĝe malfermitaj okuloj, por serĉi kavetojn, en kiuj ili povis meti siajn hufojn kaj paŝetis antaŭen iom post iom. Ĉiujare, la de ili propramane produktitaj grenoj, fruktoj kaj brulaĵoj kaj ankaŭ la de ili bezonataj industriaĵoj por la laboro kaj vivo, ĉiuj estis transportitaj laŭ tiu vojeto de ili mem sur la dorso aŭ per azenoj. Kvankam post ĉiu vojiro ili estis same ŝvitoplenaj, tamen ili neniam ĝemis, por ne paroli pri plendo. Kial? Ĉar, ili loĝantaj sur la montoj ĉiam iris tian vojeton de generacio al generacio.

La Granda Proleta Kultura Revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, kvazaŭ printempa tondro, ekskuis, kaj kiel radianta ruĝa suno prilumis Daŝuva.

Alttensia drato alflugis de la ĉefurbo Pekino, trans la lazuran ĉielon, ebenaĵon kaj akvorezervejon kaj estis firme ligita ĉe la pintoj de vico da stangoj el ruĝaj pinoj sur la alta monto. En la vilaĝo estis instalitaj radioaparatoj kaj megafonoj. La voĉoj de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio senpere atingis la orelojn de Daŝuva-anoj. Kiam projekciilo funkciis, la heroaj proletaj figuroj en la revoluciaj modelaj teatraĵoj aperis antaŭ la Daŝuva-anoj. La lokanoj ekaŭdis ankaŭ la triumfajn kantojn de Daking-aj laboristoj kaj ekvidis la kolorajn kaj ĝojigajn bildojn pri riĉrikolto de Daĝaj-aj komunumanoj. Ĉio ĉi tio, kvazaŭ oleo, priverŝis la brulantan revolucian entuziasmon de la Daŝuva-anoj kaj pliardigis ĝin.

Ili kun ekscitiĝo varme diskutis:

"Prezidanto Maŭ ja plej multe zorgas pri ni, la amasoj en la malnova montregiono!"

"Ni devas bone lerni de la herooj!"

"Kompare kun aliaj, ni Daŝuva-anoj ja kontribuis tro malmulte al la ŝtato!"

"Ve, en tio kulpas la malfacileco de la trafikado ĉi tie!"

La Granda Proleta Kultura Revolucio pluapaŝe antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la industria kaj agrikultura produktado. Daŝuva sukcesis akiri por si novtipan draŝmaŝinon, kiu estis jam portita per aŭto al Hingĉenzi. Ĝi ja estis la unua maŝino kaj granda ĝojo por tiu ĉi fora vilaĝeto sur alta monto. La motoristo jam estis trejnita, kaj la

loko por instali la maŝinon ankaŭ estis pretigita, sed kiamaniere veturigi ĝin al Daŝuva, kiam nek homaj dorsoj nek tiuj de azenoj kapablas tion fari. Laŭ malnova kutimo — do vektoporti. Post interkonsiliĝo, oni elektis 24 plej fortajn junulojn el la produktaj taĉmentoj kaj komisiis unu komitatanon de la partia filio kiel la estron. La junuloj ekĝojis el la tuta koro kaj neniu el ili ŝparis sian forton. Nelonge for de Hingĉenzi vektoportante la maŝinon sur la ŝultroj, ili komencis grimpi sur la deklivon. Kun la pezego sur la ŝultroj, ili paŝetis kaj paŝetis kaj fine alvenigis la maŝinon, uzinte du plenajn tagojn por la distanco de 5 kilometroj.



Kiam la maŝino atingis la brigadan oficejon, la sekretario de la partia filio parolis kun ekscitiĝo:

"Gekamaradoj, antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, Liu Ŝaŭki antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucian reviziisman linion kaj malhelpis nin lerni de Daĝaj, tiel ke ĉe ni estis nek maŝino nek elektro, kaj la montoj estis dezertaj, la grundoj sterilaj kaj la produktokvanto malalta. Nun, la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ akiris grandan venkon, kaj ni nepre devas pli multe kontribui al la socialisma revolucio! Prezidanto Maŭ montris, ke **'la fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo'**, sed, al ni maŝinoj ne povas esti facile alveturigitaj, eĉ kiam ni povus ilin havigi, nek la elektro plene utiligata. Ĉu estas konvene, se ni ne forigu tiun ĉi malgrandan vojon?"

Liaj vortoj ĝuste trafe tuŝis la korojn de la amasoj. Ĉiuj ekkriis en unu voĉo:

"Konstruu anstataŭe tuj grandan vojon!"

............

Post la aŭtuna rikoltado, ili tuj venigis de la urbo teknikistojn por mezurado. Vidante la teknikistojn kun mezuraparatoj en la manoj kaj alterne koloritaj stangoj sur la ŝultroj, ĉiuj komunumanoj ekĝojegis el la tuta koro. Ili sentis, ke nova vojo baldaŭ aperos en Daŝuva. Multaj eĉ ekkuris sur la nove konstruita granda vojo en la sonĝoj! Tamen, la teknikistoj sciigis al ili, ke sole por kons-

trui vojon longan je 5 kilometroj, de la brigada oficejo ĝis la montpiedo por ligiĝi kun la ŝoseo, nun konstruata de la gubernio, oni devas pagi 150 mil juanojn! Tian grandan sumon la Daŝuva-anoj ja neniam imagis.

Profitante tiun okazon, iuj malbonuloj dissemis onidirojn, ankaŭ kelkaj komunumanoj perdis sian fidon pri la konstruebleco de vojo. Iuj malicaj blovoj leviĝis kaŝe aŭ malkaŝe:

"Per la fortoj de tiel malgranda vilaĝo, kiel Daŝuva, la volo konstrui mem ŝoseon sur la pinto de alta monto estas nenio alia ol ascendi la ĉielon per ŝtupareto!"

"Por tia granda konstruo, ni prefere petu investojn de la ŝtato!"

La partia filio de Daŝuva estas batala fortikaĵo forĝita, kaj la tieaj komunumanoj estas novaj homoj harditaj, ambaŭ en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ili jam spertis multajn provojn kaj altigis sian konscion pri klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. La partia filio senprokraste organizis la partianojn kaj kadrojn lerni kune kun la amasoj la artikolon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, disvolvis amasan revolucian kritikon kaj haltigis la herezajn blovojn. Ĉe la amasa kunveno, la sekretario de la partia filio diris:

"Ĉu ni kuraĝas aŭ ne, ĉu ni povas aŭ ne konstrui tiun vojon, tio estas grava problemo koncernanta, ĉu ni Daŝuva-aj komunumanoj povas aŭ ne kontribui al la socialisma revolucio kaj serioze plenumi la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ! Se nur ni havas decidemon, ĉia ajn obstaklo estas forigebla!"

Informiĝinte pri tio, la sekretario de la partia komitato de Hingĉenzi-komunumo persone venis al Daŝuva. Li kuraĝigis la partian filion kaj la amasojn, kaj konigis al ili la sperton pri konstruo de vojo sin apogante sur propraj fortoj. Fariĝis pli firma ilia memfido kaj pli forta ilia decidemo. Ili esprimis:

"Antaŭe, pro nebona plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni iris vojon malnovan kaj malgrandan; nun, ni devas efektive plenumi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, ni nepre devas iri vojon novan kaj grandan! Se ni sekvos ĝustan vojon ideologian kaj politikan, ni certe sukcesos konstrui la vojon sur la monto."

Oni elektis 37 elstarajn gekomunumanojn, kiuj formis el si vojkonstruan taĉmenton. Sub la persona gvido de sekretario kaj vicsekretario de la partia filio ili difinis la vojlinion, starigis flagojn kaj venis al la montdorso de Huolingoŭ troviĝanta inter la brigado kaj la ebenejo de la komunumo, por malfermi al si tie batalkampon. La sekretario de la partia komitato de la komunumo laboris kiel unu el la membroj de la taĉmento kaj faris la unuan frapon per pioĉo sur la vojeto, sur kiu homoj jam iris tiom multe da jaroj.

Por elhaki ŝoseon sur ŝtonmonto, ne sufiĉis sole pioĉoj kaj ŝoveliloj, necesis ankaŭ grandaj kvantoj da dinamito por eksplodigi ĝin. Iu eksarmeano proponis: "Ni mem faru dinamiton!" Li gvidis sub si tri komunumanojn sentimajn kaj atentemajn. Ili aĉetis iom da kemia sterko nitroamoniako kaj de la komunuma liganaĵmetiejo prenis iom da segaĵo kaj akiris ian kvanton da mazuto, por komenci la eksperimenton, mem rostante kaj muelante. Malsukcesoj ne povis timigi kaj haltigi ilin. Sukcesinte, ili plue klopodis por altigi la eksplodpovon. Dum la tuta procezo de konstruado de la vojo, ili zorgeme fabrikis pli ol 12 mil kilogramojn da dinamito.

Por mem fabriki tiom multe da dinamito, ne sufiĉis la sekaĵo sole de la komunuma lignaĵmetiejo. Du maljunaj malriĉkamparanoj memvole surŝultrigis la taskon. Ili venis al la kabano por arbargardisto kaj komencis tie lignaĵan laboron. Ili faris abelkestojn per lignotabuloj segitaj el brulligno antaŭe destinita por forvendo. La monon akiritan per vendo de la abelkestoj ili kontribuis al konstruo de la vojo, kaj la segaĵo por fabriki dinamiton. Iuj proponis, ke la brigado simple fondu lignaĵan fabrikon. La brigada partia komitato akceptis tiun proponon. Kaj post ĝia ekfunkcio ne nur estis abunde kontentigitaj la bezonoj pri segaĵo por dinamitfabrikado, sed ankaŭ produktiĝis multe da agrikulturaj instrumentoj kaj mebloj. Kaj ĝia enspezo dum unu jaro jam atingis 12 mil juanojn.

La dinamito estis pretigita, sed kiuj scipovis fari bortruon kaj eksplodigon? Tio estis afero ne bezonanta zorgon. Informiĝinte pri la ĝojiga afero de konstruo de la vojo kaj la nuna bezono, iu maljuna malriĉkamparano, laborinta en orminejo por kapitalisto en la malnova socio kaj nun turmentata de astmo de multaj jaroj, forlasis la liton kaj venis al la kadroj kun la propono: "Lasu tion al mi, mi scipovas tion fari!" Iu demandis lin: "Ĉu tion permesas via sanstato?" Li respondis: "Mi devas kontribui mian forton al la grava afero de konstruo de socialismo, kiam mi ankoraŭ havas forton por spiri." Kun kvin junuloj kiel siaj metilernantoj, li eklaboris ĉe la konstruejo, uzante tri ŝtalajn borstangojn. En la tempo, kiam la



vojkonstrua taĉmento sole laboris, ilia borado bone sufiĉis. Tamen, kiam ĉiuj komunumanoj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉu viraj aŭ virinaj, ĉiuj venis al la konstruejo por amase sturmi la konstruan laboron dum la sezono libera de kampaj laboroj, tiam la tri ŝtalstangoj jam tute malsufiĉis. Aro da junuloj vete sin anoncis por partopreni en tiu laboro, inter kiuj ankaŭ ses junulinoj firme postulis labori kiel stango-tenistoj aŭ martelistoj. Tiamaniere, eklaboris 40 personoj funkciigante 20 ŝtalstangojn. Dank' al tio la konstruado progresis multe pli rapide.

**"La popolamasoj posedas senliman krean povon."** Kiam mankis ŝnuregoj, ili mem tion faris. Kiam ŝtalstangoj estis eluzitaj, ili riparis ilin en forno mem starigita. Kiam ne sufiĉis puŝĉaroj, lignaĵistoj faris ilin kun lignoradoj provizitaj ĉirkaŭe per kaŭĉuka bendo, kun tiaj radoj la ĉaroj estis same facile uzeblaj.

La partianoj kaj kadroj de Daŝuva estis pioniroj sur la revolucia vojo kaj ankaŭ sturmantoj por elhaki revolucian vojon. Kie estis la plej peniga aŭ plej danĝera laboro, tie ili certe troviĝis. Ĉiutage, ili la plej fruaj iris al la laboro kaj revenis la plej lastaj, kiam la nokta firmamento estis plene kovrita de brilantaj steloj. La estro de la vojkonstrua taĉmento laboris kiel eksplodigisto pli ol du jarojn dum la tuta procezo de la konstruado. La vicsekretario de la partia filio servanta kiel la politika direktanto de la vojkonstrua taĉmento estis honore titolita de la amasoj kiel "danĝerforigisto". Post ĉiu eksplodo, li ĉiam persone kontrolis la mutajn

dinamitotruojn, en nitrofumoj, ne pensante pri sia propra sekureco. Li permesis al komunumanoj antaŭeniri nur tiam, kiam la sekureco estis certigita. Jen, tiel la partianoj kaj kadroj edukis per siaj propraj kondutoj, junajn komunumanojn kaj la lastaj ankaŭ prenis ilin kiel siajn lernindajn ekzemplojn. Dum la tuta procezo de la konstruado, senĉese aperis inter la vojhakantoj multaj junuloj, iuj laboris senhalte kun sangantaj fingroj, vunditaj de martelo, aliaj kunpremis siajn dentojn por persisti silente en la laboro kun ŝvelinta piedo frapita de ŝtono . . .


Ĝuste kun tiaj spirito kaj energio la heroaj popolamasoj, per ŝtalstangoj, dinamito, ŝoveliloj kaj pioĉoj, forigis la ŝtonvojeton, pendintan sur la montpinto iritan jam de jarmiloj, por lasi la lokon al nova vojo, 5 metrojn larĝa kaj 5 kilometrojn longa, kondukanta de la pordo de sia brigada oficejo al la transa ebenejo, post la alta monto. Ili forigis cent mil kubmetrojn da ŝtono colon post colo, kaj metron post metro, serpentume ĉirkaŭ la monto, dum du kaj duono da jaroj, ĝis la ŝoseo ĉirkaŭiranta la monton estis finkonstruita kaj malfermiĝis al uzado.

Iras antaŭen la vojo, la homoj kaj ankaŭ Daŝuva! Samtempe kun la konstruado de tiu nova vojo, ili ankaŭ energie ebenigis la kampojn, konstruante pli ol ducent murojn por teraskampoj, kies ŝtonkvanto superis 40 mil kubmetrojn. Rezulte de tio, la totala produktokvanto de greno de la brigado salte leviĝis de 230 mil kilogramoj antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio al pli ol 300 mil kilogramoj en 1974. Krome, ili forstumis pli ol 220 hektarojn, per plantado de morusujoj, kaŝtanarboj kaj multaj fruktoarboj, kulturebligis 8.5 hektarojn da virga tero sur la monto por kulturi ginsengon kaj aliajn drogherbojn, kaj fosis tri grandajn putojn. Aŭtune de 1974, ili la unuan fojon en la historio kulturis tritikon en Daŝuva. Cetere, la brigado kaj la produktaj taĉmentoj konstruis sume domojn kun 69 ĉambroj por publika uzado. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la komunumanoj de Daŝuva kritikis per sia praktikado la koncepton de Konfucio pri "destino de la ĉielo" kaj la absurdaĵojn de Lin Biaŭ kalumniantajn la grandan kulturan revolucion, kaj samtempe edukis sin mem kaj altigis sian politikan konscion. Nun, plenaj de memfido, ili marŝas antaŭen, daŭrigante la konstruadon de novaj vojoj. Ili volas kunligi la ses tieajn vilaĝojn per larĝaj kaj glataj ŝoseoj. Hodiaŭ ne plu ekzistas homo, kiu opinius ke malgranda montvilaĝo ne kapablas entrepreni tiel grandan aferon. Multaj siatempaj dubemuloj fariĝis hodiaŭ aktivuloj kaj ĉefaj fortoj en la konstruado de novaj vojoj. Tiu ŝanĝiĝo estas same signifoplena.


Nun, la ĉirkaŭmonta ŝoseo konstruita de Daŝuvaanoj jam ligiĝis kun la ŝoseo kondukanta al la ĉefurbo Pekino. La unua aŭto, kiu trakuris tiun ĉi vojon, ja venis rekte de Pekino al Daŝuva. Tiutage, ĝoje kiel en festo, ĉiuj en la vilaĝo svarme jubilis sur la aŭtohaltejo antaŭ la brigada oficejo. La 84-jara avino Li, kiu ne descendis de la monto jam 40 jarojn, neniam vidis, kia estas aŭto. Tiutage, kun emocio kaj irbastono en la mano, apogate de sia nepo, ŝi alŝovis sin antaŭ la aŭton; kaj rigardante kaj palpe karesante ĝin, ŝi ne povis sin deteni de varmaj larmoj. Ŝi diris: "Sen la Granda Proleta Kultura Revolucio, kiel mi povus ĝisvivi tiel grandan ŝanĝon en nia loko!"

Prave! En Daŝuva ŝanĝiĝis la pensoj de homoj kaj la fizionomio de la tero. La ŝanĝoj estas malfacile kalkuleblaj. Nun, en la brigado ekestis maŝinoj por draŝado, dispecigo, fojnotranĉado, grenventumado kaj muelado, dizeloj kaj elektromotoroj. Sur la nove konstruita vojo, libere veturas iliaj mantraktoroj, kies "dadada"-bruado similas al ĝojridado, al kantado kaj al la fiera kriado de la herooj de Daŝuva: Kiel grandajn ŝanĝojn alportis al ni la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio! Por solidigi kaj disvolvi tiun bonegan revolucian situacion ni devas ankoraŭ klopodi, senhalte marŝi sur la socialisma vojo kaj batali ĝis la efektiviĝo de komunismo!

*Ilustrita de* **Ĉen Juhian**



# Nova Ŝanĝiĝo de la Tiangin-a Pezmaŝina Fabrik




Metallaborejo


La nomita fabriko estis kunigita de dekkelkaj algrandaj fabrikoj en 1965, kiu nomiĝis siampe fabriko de fandajoj kaj forĝajoj. En la ro 1970, helpate de frataj fabrikoj, ĝi memkonsuis 6,000-tunan hidraŭlikan premmaŝinon per nu jaro, kio multe altigis la produktivon kaj ovigis la ekipajojn de la laborejoj. Nun ĝi m povas fabriki grandajn metalurgiajn, mi-jajn kaj pezlevajn ekipajojn kaj grandajn aŝinpartojn por produktado de hidroelektro, okonstruado k.a.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, vasta amaso de kadroj, laboristoj kaj oficistoj la tuta fabriko levis varman tajdon studi la rkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ, rte kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman ion, kaj alte tenante la flagon de la **Ĉarto de Anŝan-a Ferŝtala Kompanio** profunde disvolvis nasan movadon de lerno de Daking en induso, tiel ke ĝiaj produktaj rekordoj noviĝis gon post tago. En 1974, ili plenumis la tjaran taskon antaŭdate je tri monatoj. De kuranta jaro, la tutfabrikaj laboristoj kaj icistoj sin jetis en la novan impeton de nia cia ekonomio per elstaraj atingoj de revolucio j produkto.



Juna fornegoestro Ĝang Baŭhı (maldekstre) kaj liaj kolegoj antaŭ fornego


Muldado






La memfarita 6,000-tuna hidraŭlika premmaŝino prilaboras grandan ŝtalan ingoton.

Prilaborado de la meza akso uzata de ŝipo








Ĝenerala inĝeniero kune kun laboristoj solvas problemon de produktado en laborejo.


Prilaborado de maŝinparto de granda pezleva ekipaĵo







Gvidantaj kadroj kune kun laboristoj studas la teorion pri la diktaturo de la proletaro.

Sekretario de la partia komitato de la fabriko intime interparolas kun laboristoj en laborejo.




Sun Ginhua (virino), reprezentanto de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, ofte partoprenas en produkta laboro post kiam ŝi fariĝis gvidanta kadro.





Munti moderatoron al laminatilo



Veterana laboristo Oŭ Gingting faras teknikan renovigon.

Alezi grandan maŝinparton per memfarita alezila stango






La Tiangin-a Pezmaŝina Fabriko

JUAN GIANG:

# Li Efektivigis Sian Deklaron

## —Noto pri avangarda agado de Li Guangking

LA 70-jara Li Guangking, sekretario de la partia filio de Ĝuanggiakiaŭ-brigado de Fengŝu-komunumo, Taŭjuan-gubernio, Hunan-provinco, estas agrikultura labormodelo kaj reprezentanto de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso. En la lasta jaro li kulturis kvin muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da eksperimenta kampo kun tri rikoltoj de vintra tritiko, frua kaj malfrua rizoj en unu jaro, kaj la meznombra pomua produktokvanto atingis 1564.7 kg. Antaŭ kvin jaroj, li deklaris en la partia kunveno sian strebon al la celo: "Kiam mia aĝo atingos 70 jarojn, la pomua produktokvanto de greno superos 1500 kg." Nun li efektivigis sian deklaron je unu jaro pli frue ol la deklarita dato.

En la jaro de Liberiĝo 1949, li jam havis 44 jarojn, kiujn li pasigis en mizera vivo dum la malnova socio. Post la Liberiĝo li ricevis agrojn kaj fariĝis mastro de la kamparo kiel aliaj samsortuloj. Tiam li decidis energie kulturi la kampojn kaj produkti pli da greno por subteni la socialisman konstruadon. Kiam la Partio alvokis vastajn kamparanajn amasojn organizi sin, li kun tieaj kamparanoj starigis la unuan agrikulturan produktan kooperativon en Taŭjuan-gubernio. En la jaro 1958, kiam Prezidanto Maŭ Zedong faris la grandan alvokon **"Bona estas la popola komunumo"**, li aktive aliĝis al la popola komunumo kune kun la kooperativanoj.

La hejmloko de Li Guangking situas okcidente de Dongting-lago renoma kiel "lando de fiŝoj kaj rizo", kaj tie la klimato estas milda, pluvokvanto riĉa kaj naturaj kondiĉoj kompare bonaj. Sed en la malnova obskura socio, la bienuloj okupis plejparton de la kampoj kaj la produktaj rimedoj kaj kruele subpremis kaj ekspluatis la kamparanojn, tial la agrikultura produkto estis tre malalta kaj pomua produktokvanto de greno atingis nur ĉ. 100-150 kilogramojn. Li Guangking ofte pensis: Nun, la bienula klaso jam estis faligita de ni kaj la laboruloj fariĝis mastroj de la ŝtato. Kun la ĝusta gvidado de la Partio kaj favoraj naturaj kondiĉoj ni certe povos pliigi la agrikulturan produkton. Sub la aktiva gvido de Li Guangking, la komunumanoj ebenigis kaj ordigis la grundojn, entreprenis akvomastrumajn konstruaĵojn kaj reformis la malnovan kulturan sistemon. En la pasinteco, tie oni nur kulturis rizon unufoje en unu jaro. Post ripetada provado, ili kulturis dufoje en unu jaro, tiel ke la jara pomua produktokvanto de greno superis 500 kilogramojn.

Ĉirkaŭ la jaro 1960, kiam ili kun plena memfido ellaboris novan planon, tie okazis seriozaj naturaj katastrofoj en sinsekvaj tri jaroj kaj la produktokvanto de greno ekfalis. Malleviĝo de agrikutura produkto ne nur portis al komunumanoj malfacilojn, sed ankaŭ komplikigis klasan batalon en la kamparo. Bienuloj kaj kulakoj ekstreme ĝojis pri la malfaciloj kaj sekrete agitis la komunumanojn anstataŭigi agrikulturadon per komercado celante pluapaŝe subfosi la kolektivan ekonomion. Parto da komunumanoj, unuj pro egoismo de etproduktisto zorgis nur pri sia rezervita parcelo sub sia persona dispono, aliaj anstataŭ partopreni en kolektiva produkto iris sin okupi pri etkomercado. Precipe grave estis, ke iuj gvidantoj de la gubernio eĉ distrumpetis la politikon de "fikso de produktokvoto bazita sur familia mastrumado" antaŭenpuŝatan de Liu Ŝaŭki, instigante ke oni dividu la teron inter la kamparanoj en kadra kunveno kunvokita de la gubernio. Konsciante ke tio nepre kondukos la popolan komunumon al ruiniĝo kaj kapitalismo restariĝos en la kamparo, tiel ke la vasta kamparanaro refoje falos en mizeron, Li Guangking abrupte ekstaris kaj forlasis la kunvenejon, deklarante: "Mi ne aŭskultos tian absurdaĵon!"

Post kelkaj tagoj, la guberniaj gvidantoj petis lin iri pririgardi iun ekzemplon de "produkto bazita sur familia mastrumado" por disvastigi lian vidkampon. Sed li rikanis dirante: "Ne necese, la mizeron de individua mastrumado mi jam sufiĉe suferis en la pasinteco!" La sendito de la supera instanco minacis eksigi lian oficon de sekretario de brigada partifilio, sed ĉia premo ne povis ŝanceli lian firman decidon iri la socialisman vojon. En tiu tempo, li ripetade propagandis al la amasoj la superecon de kolektiva mastrumo kaj admonis tiujn komunumanojn, kiuj estis kompare egoismaj, ne lasi egoismon vuali sian vidon por klare vidi la situacion kaj ne fali en kaptilon de klasaj malamikoj. Li diris el la tuta koro: "Ni absolute ne devas iri returnen! Nur se ni unuiĝos kaj persiste iros la socialisman vojon, ni certe venkos la provizoran malfacilon." Sub lia gvidado, la komunumanoj de Ĝuanggiakiaŭ ne fleksiĝis sub la kapitalisma vento de individua mastrumo kaj baldaŭ rebonigis kaj disvolvis la agrikulturan produkton.

*Li Guangking en kampo*



Li Guangking varme amas la socialisman aferon kaj havas grandanimecon de avangardo de la proletaro. Trovinte ke malalta estas la grena produktokvanto de la sepa produkta taĉmento, li forlasis la trian produktan taĉmenton, kiu akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj, kaj aliĝis al la sepa produkta taĉmento por transŝanĝi ties produktan fizionomion kune kun ties membraro. Pri tio preskaŭ ĉiuj komunumanoj laŭdis lin, sed malmultaj diris: "Ja stulta estas Li Guangking, en kio estas profito, ke li ne gardas sian rizujon por salti en branujon!" Sed li respondis: "Liberiĝinte el mizero oni ne devas gardi nur sian propran rizujon. Kiel komunisto, oni devas memvole salti en branujon por la revolucio!" Post la transloĝiĝo, li kaj la amaso kune penis en malfaciloj por kelkaj jaroj kaj dank' al ilia klopodado la produkto de greno de la taĉmento kreskis de jaro al jaro kaj vicigis ĝin post kelkaj jaroj inter la avangardoj.

Post la hardado en la Granda Proleta Kultura Revolucio, Li Guangking ekhavis pli vastan horizonton. Li decidis lerni de aliaj lokoj spertojn pri tri rikoltoj de tritiko — rizo — rizo en unu jaro por bone fari sciencan kulturadon de kampoj kaj pli multe kontribui al la revolucio. La kamaradoj de la partifilio de brigado kaj de scienca grupo ĉiuj aktive subtenas lian revolucian spiriton kuraĝi en pensado kaj agado. En vintro de 1966, Li Guangking kulturis vintran tritikon en sia eksperimenta kampo. Sub lia influado, ankaŭ la brigado prove kulturis en parto de siaj agroj vintrajn tritikojn. Pro manko de sperto la semado malfruiĝis post la ĝusta tempo. Kiam venis la tempo por rizidtransplanto de frua rizo de la sekvanta jaro, la vintra tritiko ankoraŭ komencis spikiĝi, tial la komunumanoj povis nur forplugi la tritikojn por servi kiel sterko. Kvankam kvarmuaj vintraj tritikoj de Li Guangking estis konservitaj, tamen ĝia pomua produktokvanto estis nur 66.5 kilogramoj. Kune kun la poste plantitaj fruaj kaj malfruaj rizplantoj la meznombra pomua produktokvanto sume atingis 703.5 kg. en unu jaro, multe malpli ol tiu kune akirita de la du rikoltoj de rizo antaŭe. Pro tio iuj perdis la kuraĝon.

Sed Li Guangking ne estis ŝancelebla kaj firme diris: "En ĉiu el la tri fojoj de kulturado ni senescepte akiris rikoltojn, tio montris ke en Taŭjuan-gubernio ekzistas kondiĉoj por akiri tri rikoltojn en unu jaro. La malaltajn produktokvantojn ni ŝuldis nur al manko de sperto. Li kune kun aliaj serioze resumis la sperton kaj ripetadis la praktikon. Rezulte de tio, en la jaro 1969, ili fine akiris pli ol 850 kilogramojn de meznombra pomua produktokvanto en la eksperimenta kampo per kulturo de unufoje tritiko kaj dufoje rizo en unu jaro.

En novembro de 1970, 65-jara Li Guangking ĉeestis la Trian Partian Kongreson de Hunan-provinco. Li diris al aliaj: "Mi 21-jara, estas ankoraŭ juna kaj ĝuste en la aĝo por fari pli multan kontribuon al la Partio kaj la popolo!"

Iuj ridante demandis: "Kiel vi kalkulas la aĝon de 21 jaroj?"

Li respondis: "En la 44 jaroj en la malnova socio mi vivis kiel ŝarĝbruto, kiujn mi ne povas kalkuli en mian aĝon. Nur en la nova socio mi komencis vivi kiel vera homo, sekve mia aĝo estas nur 21 jaroj."



*Li Guangking selektas bonspecan rizon.*

En la kongreso, Li Guangking kun emocio ĵuris al la Partio: "Kiam mia aĝo atingos 70 jarojn, la pomua produktokvanto de greno atingos 1,500 kg.!" Por efektivigi tiun celon, li faris penemajn laborojn. Ekzemple, dum kulturado de rizidoj, li ĉiutage observadis kaj zorge flegis ilin. Post transplanto en la kampojn, li ĉiam venis al la rizkampoj kun rizidkorbo sur la dorso por tuj plenigi la vakajn lokojn trovitajn. Krome, li ofte iris al aliaj lokoj por lerni bonan sperton.

La Ĉangde-a Subprovinca Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la partia komitato de Taŭjuan-gubernio tre alte taksis kaj disvastigis lian sperton de 3 rikoltoj tra la tuta subprovinco. Nun tiaj kampoj jam atingis pli ol 200,000 muojn en la tuta subprovinco.

Sed, la vojo estas zigzaga. Ĝis la jaro 1973, la meznombra pomua produktokvanto de liaj eksperimentaj kampoj ankoraŭ variis nur inter 1,250 kaj 1,350 kg. Iu diris al li: "Mia amiko! Homoj, kiuj atingis la aĝon de cent jaroj estas raraj, kaj produktokvanto de greno pomue super mil kilogramoj estas malfacila, kaj la nuna atingo eble jam estas la fino!" Sed Li Guangking ne pensis tiel, li opiniis ke la latenta forto de la agraro estas granda laŭ praktika sperto. Sed kial la produktokvanto ne povis plu leviĝi? Poste li trovis la kaŭzon en sia propra penso: ĉar en la lastaj jaroj lia persona honoro pli vastiĝis kaj homoj vizitantaj lin plimultiĝis, tiel ke kreskis al li la penso kompare multe zorgi por konservi "la ruĝan flagon" kaj malkreskis al li la aŭdaco kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi. Ĝuste tio estis la radiko ke la produkto ne povis daŭre kreski. Li do decidis senĉese serĉi novajn vojojn por pliprodukto por la revolucio, sinapogante sur la saĝo de la amasoj.

Ekde semado de vintra tritiko en la antaŭlasta jaro, Li Guangking kaj kamaradoj de la scienca grupo alprenis plurajn renovigitajn metodojn: profunde plugi por reformi la grundon, doni pli da baza sterko, plimulte uzi la stalan kaj organikan sterkojn por akceli dikiĝon de la tigoj kaj fortiĝon de la tritiko. En la lasta jaro, la meznombra pomua produktokvanto de liaj kvin muoj da vin-



*Li Guangking (la dua de dekstre) kaj la membroj de la scienca grupo en la eksperimenta kampo*

traj tritikoj atingis 273.4 kg. kun neta kresko de 122.65 kg. kompare kun tiu en la pliantaŭa jaro.

Post riĉrikolto de tritiko, kun pli granda revolucia energio, Li Guangking kaj kamaradoj de la scienca grupo aplikis serion da novaj metodoj en kulturado de frua kaj malfrua rizoj de la eksperimenta kampo. Dank' al ilia klopodo, la meznombra pomua produktokvanto de frua kaj malfrua rizoj respektive atingis 616 kaj 675.3 kg., kreante por ambaŭ novajn rekordojn en la historio.

Kiam oni pesis malfruan rizon de la eksperimenta kampo de Li Guangking kaj konstatis ke lia meznombra pomua produktokvanto de unu jaro atingis 1564.7 kg., la amasoj ekbolis kaj ĝoje lin salutis dense ĉirkaŭ li pro lia efektivigo de lia deklaro antaŭdate je unu jaro, ke "pomua grenprodukto superos 1500 kg. kiam lia aĝo atingos 70 jarojn". Li Guangking respondis kun alta revolucia entuziasmo: "La revolucio ne havas limon nek la produkto kulminon, kaj ni devas krei pli altan produktokvanton por la patrolando."




## LA UNUA ĈINA PROSPEKTORA ŜIPO SUKCESIS EN PROVA DRILADO

La unua surmara geologia prospektora ŝipo "Prospektoro 1", projektita kaj konstruita de nia lando mem, sukcese drilis en suda parto de la Flava Maro petrolesploran puton kaj havigis al nia lando la unuajn spertojn por geologia prospektorado en pli profunda maro.

En la lastaj jaroj nia lando jam faris geologian prospektoradon en maro. Tamen tian laboron oni povis fari nur en malprofunda aŭ proksima maro uzante esploran ekipaĵon de la tipo de fiksita platformo sur fostoj. Dank' al konstruo de la ŝipo "Prospektoro 1" ni komencis esploradon antaŭ nelonge en pli profunda maro. La sukceso de prova drilado de la ŝipo montris novan disvolviĝon de nia geologia prospektora afero.

Dum laborado la ŝipo "Prospektoro 1" plenumis la taskojn de fiksigo de putpozicio, instalado de instrumentoj sub la akvo, putodrilado, ankrado, putfortikigo kaj plenaj provadoj de diversaj aparatoj. Spertinte 8-a-gradan ventegon kaj 9-a-gradan ekblovon, la ŝipkorpo ne deformiĝis kaj la ankra sistemo povis ankoraŭ teni la ŝipon super la puto, garantiante normalan laboradon de la ŝipo. La ekipaĵoj por putodrilado kaj diversaj specialaj aparatoj funkciis normale. La muntado de subakvaj instrumentoj estis sukcese plenumita en unu fojo.

# Sekretariino Vang Jalan

EN Mijun-gubernio en la norda ĉirkaŭurbo de Pekino troviĝas iu brigado nomata Hinnongcun, kie loĝas pli ol 600 familioj. Ĝia partifilia sekretario estas 21-jara kompartianino Vang Jalan. Sub la gvido de ŝi kaj la partia filio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj profunde kritikis Lin Biaŭ kaj Konfucion, serioze lernis la revolucian spiriton de Daĝaj kaj firme iris la socialisman vojon, tiel ke ilia pomua produkto de greno atingis 789 kilogramojn.

La komunumanoj de Hinnongcun-brigado diris: Estas tute ne facile, ke la tiel granda brigado sub gvido de la juna sekretario akiris tiel riĉan rikolton! Vere la granda kultura revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio povas elbaki novan homon! Sed Vang Jalan diris: "Ĉion ĉi tion oni ŝuldas al tio, ke la komunumanoj de la tuta brigado aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj plenumis la instrukciojn de la Partio."

## FERA ŜULTRO HARDITA DE PEZA ŜARĜO

Post sia diplomiĝo el elementa lernejo Vang Jalan revenis al sia hejmvilaĝo por tie partopreni en produkta laboro. Post nelonge, la Granda Proleta Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ disvolviĝis tra la tuta lando. Plena de politika entuziasmo, Vang Jalan partoprenis en tiu granda revolucio kaj firme kritikis la reviziisman linion de Lin Biaŭ kaj Liu Ŝaŭki. En la batala ŝtormo ŝi iom post iom komprenis: Dank' al la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la gvidado de la Partio, la laborantaj popolanoj povas sin liberigi kaj la socialisma afero povas akiri grandajn venkojn.

En junio de 1972, Vang Jalan glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam ŝi postulis de si plimultan konsciencon en la laboro. Ŝi diligente studis Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson kaj tutkore plenumis ĉion asignitan de la Partio. Ŝi ĉiam firme obeis la decidojn de la partia organizo, kiu multfoje ŝanĝis al ŝi la laboron. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: "Tiu knabino estas bona ido, kiu aŭskultas la vortojn de la Partio, laboras serioze kaj havas ĝustan ideon."

Iufoje, sekretario de la partia komitato de la komunumo demandis Vang Jalan: "Nun, mankas al via brigado kadroj kaj krome la brigado devas sendi homojn al fabrikoj kiel laboristojn kaj al universitatoj kiel studentojn. Nu, kian planon vi havas?" Vang Jalan serioze respondis: "Kion la Partio bezonas, tion mi volas fari. Kie la Partio min sendas, tie mi bone laboras."

*Vang Jalan*



Por ŝanĝi la postiĝintecon de Hinnongcun, la partia komitato de la komunumo petis opiniojn de partianoj kaj amasoj, kaj decidis promocii Vang Jalan kiel sekretarion de la brigada partifilio laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri kulturo de daŭrigantoj de la proleta revolucia afero kaj pri la principo de triflanka kombiniĝo de maljunuloj, mezaĝuloj kaj junuloj.

Multaj maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: "Kapabla estas tiu ĉi knabino, ŝi certe povas bone porti la flagon de nia Hinnongcun!"

Multaj partianoj esprimis: "Jalan estas juna partiano kreskinta en la granda kultura revolucio, ni nepre devas subteni ŝin en ŝia revolucia laboro."

Sed, malmultaj dubis: "Ĉu kapablas tiu ĉi 21-jara knabino por mastrumi tiel grandan brigadon?"

Kvankam Vang Jalan jam delonge esprimis al la partia komitato de la komunumo sian decidon obei la aranĝon de la Partio, tamen ŝi neniam imagis pri tio ke ŝi prenos sur sin la oficon de la unua respondeculo de la brigado. Intensa batalado komenciĝis en ŝia penso: "Ĉu mi sensperta povas preni sur min tiun ĉi pezan ŝarĝon de tiel granda brigado kun tiel multaj nesolvitaj problemoj?" Tiam iuj maljunaj kadroj de la brigado kaj la partia komitato de la komunumo kaj la komunumanoj multfoje ŝin kuraĝigis. Tion faris al ŝi ankaŭ ŝia patro, kiu tutkore laboras por la kolektivo, kaj ŝia patrino, kiu multe suferis en la malnova socio kaj havas profundan malamon al ĝi. Poste ŝi restudis la instruon de Prezidanto Maŭ **"Daŭrigantoj de la afero de proleta revolucio naskiĝas en amasaj luktoj kaj kreskas hardante sin en grandaj revoluciaj ŝtormoj"**, kaj ekkreskiĝis oble al ŝi memfido: Peza ŝarĝo pruvas ŝultron fera! Ni juna generacio devas neniam vanigi la sinceran esperon de Prezidanto Maŭ kaj la Partio, nepre altigi nian kapablecon en batalado kaj bone daŭrigi la revolucian aferon, por ke la afero kreita de la revoluciaj antaŭuloj neniam ŝanĝu sian koloron.

## "OK-PUNKTA INTERKONSENTO"

Poste Vang Jalan fariĝis partifilia sekretario de la brigado.

Sed de kie komenci antaŭ amaso da nesolvitaj problemoj? Kombininte la faktojn de klasbatalo kaj dulinia batalo de la brigado, ŝi studis la instruojn de Prezidanto Maŭ **"La ĝusteco aŭ malĝusteco de la linio ideologia kaj politika decidas ĉion"**, kaj **"Post la difino de la politika linio, kadroj ja estas decida faktoro"**. Retrorigardante ŝi ĉerpis la lecionon, ke antaŭe la partia filio de la brigado ne bone faris sian revoluciigon, tial ĝi ne povis formi firman gvidkernon, nek gvidi la amasojn serioze praktiki la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Ŝi komprenis ke nur se la partia filio konstruiĝos en batalan fortikaĵon, kiu firme praktikos la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, ĝi do povos gvidi la amasojn pene konstrui socialismon kaj ŝanĝi la fizionomion de Hinnongcun-brigado.

En la kunveno okazigita de la partia filio, Vang Jalan kaj aliaj membroj studis la instruojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ pri la fortigo de ideologia kaj organiza konstruado de la Partio. Poste, ŝi proponis: Ni kadroj devas iri la socialisman vojon sed ne la kapitalisman. Ni difinu nun kelkajn punktojn por praktiki la principon de Prezidanto Maŭ, ke **'praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝema kaj honesta, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn'**, ĉu bone?" Ĉiuj aliaj aprobis ŝin dirante: "Bona ideo. Ni ja devas difini kelkajn punktojn por ke aliaj povu kontroli, ĉu ni agas laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ." Poste, ili komencis la diskutadon.

Laŭ la opinioj de la membroj de la partifilio, Vang Jalan induktis jenajn ok punktojn:

1. Serioze studi la verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, praktiki Marksismon kaj ne reviziismon;

2. Unuigi homojn "el ĉiuj partoj de la lando" kaj ne praktiki sektismon, ne diri kaj fari tion, kio malutilas al unuiĝo;

3. Agi malkaŝe kaj senartifike, kion pensi tion fari, diri opiniojn publike sed ne postdorse;

4. Persisti pri la fundamenta linio de la Partio, iri la socialisman vojon, esti honesta kaj labori por kolektivo sed ne por individuo;

5. Persisti en kolektiva laborado kaj ne esti parazito;

6. Konsiliĝi kun la amasoj, kiam aferoj aperas, kaj sincere akcepti iliajn kontrolojn;

7. Detrui ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn malnovajn kaj starigi novajn, oponi kontraŭ malŝparemo kaj absolute ne akcepti invitojn al festeno nek donacojn;

8. Esti kuraĝa en kritiko kaj memkritiko.

Kio oni ilin nomas? Vang Jalan diris: "Tiuj ĉi ok punktoj estis de ni kolektive difinitaj, per kiuj ni poste devas ofte kontroli nian laboron. Ni ilin nomas 'Ok-punkta Interkonsento', ĉu bone?" Ĉiuj aliaj aprobis ŝin.

"Ni ĝin skribu kaj gluu sur muron!" proponis iu membro.

Vang Jalan tamen diris: "Estas ne sufiĉe tion fari. Ni devas ĝin presi kaj sendi al la familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, por ke la lastaj povu kontroli nin."

Rigardinte tian grandan decidemon de Vang Jalan, ĉiuj kore ĝojis. Ili dissendis la presitan interkonsenton de domo al domo, kaj ĝin legis al ili punkton post punkto.



*Vang Jalan (la dua de dekstre) kaj aliaj kadroj kune resumas sperton pri riĉa rikolto de maizo.*

Aŭskultinte tion, la komunumanoj ĝoje diris: "La nova gvidgrupo vere havas novan fizionomion. Nur se la partia filio iras la ĝustan vojon, la malnova fizionomio de Hinnongcun-brigado certe ŝanĝiĝos."

## KOMPARTIANO ESTAS PORTANTO DE RUĜA FLAGO

La batalo senĉese provis Vang Jalan kaj altigis ŝian politikan nivelon. Hinnongcun-brigado estis kunigita de kelkaj vilaĝoj transloĝiĝintaj pro la konstruado de Mijun-akvorezervejo. Tie plimultaj estis la homoj kaj malplimultaj estis la kampoj. Antaŭe, ekzistis serioza kapitalisma tendenco "forlasi agrikulturon por entrepreni flankokupojn" pro influado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. La pneŭmatikaj ĉaroj kaj traktoroj de la brigado ofte faris transportadon por aliaj, kaj iuj komunumanoj tutjare laboris kiel provizoraj laboristoj ekstere. Ĉio ĉi tio grave malhelpis la agrikulturan produktadon, kaj tre maltrankviligis Vang Jalan. Kion fari?

Post la lernado de *Manifesto de Komunista Partio*, *Kritiko de Gothaer-programoj*, *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj la instruo de Prezidanto Maŭ **"La fundamenta tasko de la politika laboro estas senĉese inokuli la socialisman ideologion al la kamparanoj kaj kritiki ilian kapitalisman tendencon"**, Vang Jalan komprenis, ke por transŝanĝi la fizionomion de Hinnongcun-brigado kaj okupi la pozicion de kamparo per socialismo, oni nepre devas eduki kadrojn kaj amasojn per la fundamenta linio de la Partio, batali kontraŭ la kapitalisma tendenco kaj senŝanceliĝe iri la socialisman vojon. Por efektivigi tion, oni devas fari longtempan batalon kaj penigan kaj delikatan ideologian laboron.

Post la studado kaj diskutado, Vang Jalan kaj aliaj membroj de la partia filio plene mobilizis la amasojn por profunde kritiki la reviziisman linion de Lin Biaŭ, tiel ke ĉiuj plue levis la konscion pri la batalo inter la du linioj. Sur tiu bazo, la partia filio elmetis al la amasoj jenajn demandojn: "Kien devas veturi la traktoroj kaj pneŭmatikaj ĉaroj?" "Kie devas esti uzataj la laborfortoj?" La lastaj diris: "Lin Biaŭ volis restarigi kapitalismon kaj regrese iri la kapitalisman vojon, ni do devas persisti en revolucio, antaŭen marŝi kaj energie konstrui socialismon." Ĉiuj produktaj taĉmentoj revenigis siajn homojn, brutojn kaj veturilojn servantajn ekstere kaj rapide levis la varman tajdon de agrikultura produktado. Dank' al tio, grandmezure altiĝis la produktokvanto de greno kaj multiĝis la neta enspezo de flankokupoj.

La situacio de Hinnongcun-brigado pli kaj pli boniĝis. La amasoj ofte laŭdis la laboron de Vang Jalan. Sed ŝi neniam fieris. En sia laborado,

ŝi donis apartan atenton al disvolvo de demokratio kaj iro de amasa linio por serioze praktiki la demokratian centralizismon de la Partio.

Tiu ĉi brigado lokiĝas ĉe la piedo de Janŝanmontaro, ĝiaj kampoj dispecigitaj troviĝas sur malsama alteco. Post la granda kultura revolucio, kvankam ĉiu produkta taĉmento faris iom da fundamenta konstruado de kampoj, tamen ĝi ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon de kampa ĝardenigo kaj agrikultura mekanikigo. Tio malhelpis la leviĝon de la grenaj produktokvantoj.

Por solvi tiun problemon, Vang Jalan kaj parto de kadroj elmetis, antaŭ la somera rikolto de la jaro 1974, terreguligan projekton por efektivigi ĝardenigon post konsultado ĉe vastaj amasoj.

Pri tiu ĉi projekto plimultaj kadroj jesis, tamen malplimultaj ne. Tiam, iu kadro malpacienciĝis kaj diris: "Ni do tuj ĝin voĉdonu!"

Tamen, Vang Jalan diris: "Ni devas kaj aktive solvi tiun aferon kaj fari ĝin laŭ la partia politiko. Ia ajn fuŝaĵo povos sufoki la aktivecon de la amasoj. Nun jam troviĝis la malsama opinio, ni devas refoje diskuti la projekton. Oni povas ankaŭ elmeti alian projekton, por plibone solvi la problemon."

Kiam la dua projekto naskiĝis, ankaŭ iuj aliaj kadroj ĝin malaprobis. Tiel, la diskutado daŭris ĝis la sesa projekto, sed ankoraŭ kun malsamaj opinioj. Tiam iu kadro jam tute perdis sian paciencon kaj diris: "Vi estas sekretario, Jalan, decidu do! Alie daŭros tio senfine."

Vang Jalan pacience diris ridante: "Kiel sekretario mi ne devas ĝin decidi arbitre! Pli bone ni diskutu ankoraŭfoje."

Tiamaniere, naskiĝis fine iu kontentiga projekto post okfojaj diskutadoj kaj plenaj konsiliĝoj.

La projekto trovis aprobon ĉe la tuta komunumanaro. En la sezonoj de kampĝardenigado kaj rikoltado Vang Jalan ne povis eĉ unu fojon kviete manĝi kaj dormi. Tiam ŝi ellitiĝis ĉiutage je la tria horo. Kie ekzistis pezaj taskoj, tie ŝi laboris; kie estis penigaj laboroj, tie aŭdiĝis ŝia sonora ridado. Iuj maljunaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: "Jalan laboras kiel forta knabo." Jes, Vang Jalan, kiel sekretario, neniam sin apartigis de kolektiva produkta laborado.

En la jaro 1974, kvankam Hinnongcun-brigado akiris grandan riĉrikolton, tamen Vang Jalan ĝin rigardis nur kiel novan starton por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn. Post rikoltado de ĉiuj grenoj, ŝi kaj aliaj membroj de la partia filio kune faris planon de bona lernado de Daĝaj kaj decidis akiri ankoraŭ pli grandan riĉrikolton de agrikulturo




## ORIENTITA EKSPLODADO POR TURNI MONTON EN KAMPOJN

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj-brigado kunlabore kun sciencistoj-teknikistoj de la Pekina Dinamika Instituto sukcesis konstrui kampojn per orientitaj eksplodoj de monto.

En la pasinteco, por konstrui kampojn, la Daĝaj-anoj uzis pioĉojn kaj korbojn, kaj poste ŝtalstangojn, pulvon kaj puŝcarojn. Nun dank' al la sukceso de apliko de orientita eksplodado ili eniris en novan etapon de konstruado de kampoj per uzado de grandskala eksplodo kaj buldozoj.

La unua provo okazis en la pasinta majo sur iu montpinto, kiu konsistis el leŭso supre kaj efloreska kalkroko sube, kaj ĉe kies apudeco estis valo. Per unu fojo de eksplodo, la subaj rokpecoj estis ĵetitaj en la valfundon, kaj tiujn kovris la leŭsa supraĵo. Post ebenigo de la tero per buldozoj oni ricevis kampon ampleksantan du trionojn da hektaro.

# Bejhinkiaŭ-loĝkvartalo

KIA organizo estas la loĝkvartala komitato en la urboj de Ĉinio? Kun tiu ĉi demando ni vizitis la loĝkvartalan komitaton de Bejhinkiaŭ en la nordorienta urbo de Pekino.

Estis dimanĉo. Mobilizite kaj organizite de la loĝkvartala komitato, la loĝantoj de la loko sin okupis pri purigado. Ili viŝis vitrojn de fenestroj, ordigis kortojn kaj balais stratojn. La elementaj lernantoj kun ruĝa kravato ĉirkaŭ la kolo dividis sin en grupojn kaj propagandis higienan scion per prezentado de artaj programeroj en kortoj. Jen ĉie regis gajeco. Krom oftaj purigadoj, en Pekino oni organizas ĉiujare plurajn amasajn patriotajn higienajn movadojn.

En simpla kabineto, Gju Gjunŝeng, estro de la Loĝkvartala Revolucia Komitato de Bejhinkiaŭ, rakontis al ni pri organiziĝo de la loĝantoj en la loko:

Antaŭ la Liberiĝo Bejhinkiaŭ estis loĝkvartalo de malriĉuloj, kiuj plejparte sin okupis pri rikiŝotirado, kolportado kaj ĉifonaĵo-kolektado, vendis sian forton sur hommerkato kaj vivis mizeran vivon en malaltaj kaj humidaj kabanoj.

Nun en la loko loĝas pli ol 18,000 familioj sur 108 stratetoj kaj el 500 ĝis 800 familioj elektiĝis unu loĝantara komitato. Krom laboristoj, oficistoj kaj lernantoj, plejparto el la 7,000 restantaj loĝantoj estas virinoj, kiuj jam sin organizis sub la gvido de la loĝkvartala komitato.

La loĝantoj lernas politikon, faras produktadon kaj administras la loĝkvartalon en bona ordo. La membroj de diversaj loĝantaraj komitatoj plejparte estas virinoj multe suferintaj en la malnova socio, iuj el ili almozpetis kaj aliaj estis infanobofilinoj. Post la Liberiĝo, ili fariĝis mastroj tiel en politiko kiel en ekonomio, ekvivis feliĉan vivon kaj sin ĵetis kun plena revolucia entuziasmo en servadon al socialismo.

Ĉiuj 30 loĝantaraj komitatoj de Bejhinkiaŭ laboras sub la gvidado de la loĝkvartala revolucia komitato, baza ŝtatpotenca organizo de urbo, kaj ludas la rolon de ponto inter la loĝkvartala revolucia komitato kaj loĝantoj. Ekzemple, la politikoj de la Partio kaj la registaro estas sciigataj de la loĝkvartala revolucia komitato al la loĝantaraj komitatoj kaj de la lastaj al la loĝantoj per kunveno. Se iu ajn loĝanto ne ĉeestis la kunvenon pro malsano aŭ alia kaŭzo, ĝiaj membroj poste sciigas tiujn al li en lia domo. Tiamaniere la politikoj de la Partio kaj la registaro povas esti rapide konitaj de ĉiuj loĝantoj, kaj iliaj opinioj povas esti ĝustatempe raportitaj pere de loĝantaraj komitatoj al supera instanco.

Kiamaniere elektiĝas la loĝantaraj komitatoj?

Gju Gjunŝeng diris: La loĝantaraj komitatoj naskiĝis post demokratia elektado de loĝantoj. La nombro de iliaj membroj estas malsama, la plej granda estas 15. Ĉiuj membroj estas aktivuloj emerĝintaj el la amasoj kaj postulas nenian rekompencon dum sia funkciado.

Kiel la loĝantaraj komitatoj organizas produktadon?

La loĝantaraj komitatoj de la loĝkvartalo Bejhinkiaŭ starigis pli ol 90 produktajn grupojn respektive kun dekkelkaj ĝis pli ol cent membroj, kiuj okupas sin pri vestokudrado, mebla garnado, jadopolurado, brodado k.a. Tiuj produktaj grupoj troviĝas dise en diversaj anguloj de la loĝkvartalo favore al dommastrinoj, kiuj povas partopreni proksime en produkta laboro farebla post fino de hejmlaboro. Tiuj produktaj grupoj ĉiuj estas starigitaj de dommastrinoj laŭ la spirito de sinapogo



*Lerna grupo de loĝantoj*

sur la propraj fortoj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili altigis sian politikan konscion, tiel ke ili ne nur bone faris sian hejmlaboron sed ankaŭ eliris el sia domo por aktive kontribui al la socialisma konstruado. Nun, en tiu ĉi loĝkvartalo ĉiuj loĝantoj, kiuj kapablas partopreni en produktado, fariĝis membroj de la produktaj grupoj.

Kiel la loĝantaraj komitatoj faras bonstatigan aferon?

Gju Gjunŝeng diris: La bonstatiga laboro de la loĝkvartalo estas farita laŭ la bezonoj de la loĝantoj. Nun ĉiu loĝantara komitato havas sian sanitarejon. La loĝkvartala hospitalo helpis kulturi el dommastrinoj 94 sanitaristinojn, kiuj donas kontraŭepidemian injektadon al infanoj, faras akupunkturon kaj masaĝon kaj kuracas malgravajn malsanulojn. Krome ili ankaŭ faras kuracadon al kronikaj malsanuloj. Se estas urĝa kazo, ili tuj alvenas kaj sendas gravan malsanulon al hospitalo. En la kvartalo oni praktikas kooperan kuracan sistemon. Elspezinte nur 0.05 ĝis 0.10 juano monate ĉiuj povas ĝui senpagan kuracadon kaj duonpagon por medikamentoj. La sanitaristinoj ankaŭ aktive propagandas pri la scioj de plana infannasko kaj la rimedoj kontraŭ malsanoj.

La loĝkvartalo starigis 12 infanvartejojn kiuj akceptas infanetojn kun aĝo de du monatoj ĝis sep jaroj, tage aŭ tagnokte. Por tio gepatroj de la infanoj pagas malmulton kaj la ceteron aldonas iliaj produktaj grupoj el la bonstatiga sumo. La loĝantaraj komitatoj kune fondis kvar servostaciojn por telekomunikado, litkovril-lavado, kudrado kaj flikado de vestoj kaj harotondado kiuj postulas iometon da mono. La fondistoj eĉ iras al domoj por servi al infanoj kaj malsanuloj.

Multajn progresintajn aferojn faris la membroj de la loĝantaraj komitatoj. Pri tio Gju Gjunŝeng konigis al ni la estrinon kaj vicestrinon de la Dongnejhi-a Loĝantara Komitato. Estrino Meng Ĝaŭfang estas edzino de laboristo de la Pekina Instala Kompanio de Ekipaĵoj. Ŝi ofte vizitas loĝantojn por informiĝi pri iliaj postuloj. Iuj gepatroj, kiuj ambaŭ havas laborpostenojn, diris ke iliaj gefiloj havas malfacilon en tagmanĝo post reveno de lernejo, la loĝantara komitato poste lasis la lernantojn manĝi en sia restoracio. Iuj senhelpaj gemaljunuloj havas malfacilojn en vivo, Meng Ĝaŭfang organizis aliajn loĝantojn por helpi ilin. En la komenco de vintro, ŝi kaj aliaj membroj kontrolis fornojn de domo al domo por helpi loĝantojn forigi malsekurecon. Kaj dum neĝado, ŝi mo-

bilizis amasojn al balaado de neĝo por protekti trafikadon.

Tiu ĉi virino, kiu almozpetis kaj estis infanobofilino en la malnova socio, diris: "Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio liberigis nin suferintojn, kaj ni sklavoj de la malnova socio nun fariĝis la mastroj de la ŝtato. Pensante pri tio, mi ekhavis energion kvazaŭ neelĉerpeblan en la tuta korpo. Servi al la popolo estas nia devo."

Por altigi la nivelon de virinoj en kulturo kaj politika teorio, Bejhinkiaŭ-loĝkvartalo fondis en la granda kultura revolucio ses politikajn vesperlernejojn, kaj donas lekciojn en tri vesperoj po semajno al kadroj de la loĝantaraj komitatoj kaj laboristoj de la produktaj grupoj. Ĉiu vesperlernejo havas tri klasojn, kaj la triajara klaso prenis la verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kiel sian ĉefan lernoobjekton.

Vicestrino Liu Julan estas maljunulino 69-jara. Antaŭ la granda kultura revolucio, ŝi eĉ ne scipovis skribi sian nomon. Post la fondiĝo de la vesperlernejo, ŝi aktive partoprenis en la lernado. Dum ĉ. tri jaroj, ŝi ĉiam ĝustatempe vizitis la lernejon spite al vento kaj neĝo. Nun, ŝi jam povoscias legi ĵurnalojn, mem studi la verkojn de Marks kaj Lenin kaj parkere legi kaj ekspliki multajn poemojn de Prezidanto Maŭ. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, ŝi skribis artikolojn por kritiki la ambaŭ aĉulojn. Liu Julan krome respondecas pri la eksterlerneja edukado al elementaj lernantoj. Ŝi ofte rakontas al knaboj amaraĵojn de la malnova socio kaj sian komprenon pri la verkoj de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ.

Je la fino, Gju Gjunŝeng diris: "La celo de ĉiuj niaj laboroj estas eduki amasojn per Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso kaj altigi ilian politikan konscion, por ke ĉiu el ili povu memkonscie partopreni en administrado kaj konstruado de la loĝkvartalo kaj disvolvi ĝiajn diversajn socialismajn aferojn. La proleta diktaturo de nia loĝkvartalo povas esti firmigita nur post tiam, kiam la amasoj organiziĝintaj povas sin eduki kaj administri kaj memkonscie batali por socialismo."

La nuna movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio likvidas malnovajn pensojn, morojn kaj kutimojn postlasitajn de miloj da jaroj kaj kun la profundiĝo de la movado pli granda ŝanĝiĝo okazos al la fizionomio de Bejhinkiaŭ-loĝkvartalo.




## RAPIDA DISVOLVIĜO DE PRODUKTADO DE JUTO KAJ RUĜA KANABO

Sub direktado de principo de Prezidanto Maŭ pri **"sendependeco kaj memdecido, sinapogo sur propraj fortoj"**, estis realigita la 3-jara plano por granda disvolviĝo de produktado de juto kaj ruĝa kanabo (*Hibiscus cannabus*) en nia lando dum la lastaj jaroj.

Juto kaj ruĝa kanabo estas gravaj krudmaterialoj por nia teksa industrio kaj ekzistas vastaj regionoj en nia lando por kulturi ilin. Antaŭe ili koncentre kreskis en kelkaj sudaj provincoj, tamen ilia produktokvanto ne povis kontentigi la bezonojn de la naciekonomia disvolviĝo kaj ĉiujare ni devis importi parton de ili de la najbara lando. En la komenco de la sepdekaj jaroj post kiam Hindio dismembrigis la suverenan landon subtenate de la social-imperiismo, rompiĝis la provizado de juto al nia lando. La vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj de nia kamparo decidis multe kaj bone kulturi juton por subteni la ŝtatan konstruadon. Oni ne nur plivastigis la jutkulturan areon en sudaj provincoj sed ankaŭ ekstarigis novajn produktajn bazojn de ruĝa kanabo en nordaj provincoj Anhuj, Ŝandong kaj Henan, kiuj malmulte produktis ĝin antaŭe. Nun fundamente memsufiĉas la produkto de juto kaj ruĝa kanabo en nia lando.



*Barbiroj en gimnastikado*

# Laboristaj Produktaj Gimnastikoj

JAN NAJHUA

EN facila kaj vigla melodio, grupo da laboristinoj en blankaj laborkostumoj enviciĝas en neta ordo sur la placo antaŭ la laborejo. Unu, du, tri, kvar... ili turnas siajn kapojn jen maldekstren jen dekstren kun la manoj sur la koksoj laŭ la signalvortoj de la korifeo. Je la unuaj taktoj la okulgloboj turniĝas kun la kapoj, sed en la postaj taktoj la okuloj estas fermitaj. Jen estas sceno de gimnastiko farata de la laboristinoj de la Pekina Elektronika Fabriko — la "gimnastiko por elektronikaj laboristoj". Tiuj laboristinoj faras laborojn tre precizajn, postulantajn altan koncentron de la atento, tiel ke post longa tempo iliaj okuloj tre laciĝas eĉ ĝis nebuliĝo, kio malbone influas la sanon de la laboristoj. La nomita produkta gimnastiko povas malstreĉi la okulojn kaj la muskolojn de la tuta korpo de laboristoj, liberigante ilin de laciĝo kaj plibonigante la korpostaton.

La vastaj popolamasoj de nia lando disvolvas korpokulturon, utiligante la tempojn en la frua mateno kaj dum la laborpaŭzoj antaŭ kaj post tagmezo. La plej popularaj estas la radiodisaŭdigaj gimnastikoj. Post la Liberiĝo nia lando jam publikigis kvin tiajn gimnastikojn konvenajn por diversaj aĝuloj, seksoj, profesioj kaj korpokvalitoj. Krom tiuj, nun estas disvastigataj specialaj gimnastikoj inter laboristoj kaj oficistoj, nome produktaj gimnastikoj. En Pekino ok tiaj gimnastikoj estas jam pretaj: tiuj por ŝtalistoj, karbministoj, tekstilistoj, ŝoforoj, vendistoj, masonistoj, elektronikaj laboristoj kaj barbiroj.

Tiuj gimnastikoj kreitaj laŭ la laboraj karakteroj kaj kondiĉoj de la koncernaj profesioj estas facile lerneblaj kaj bezonas nur 3-5 minutojn por fari unu kompletan ekzercon. Se la laboro ne ebligas multan movon de la subaj membroj, la gimnastiko entenas pli da movoj de la gamboj; se la laboro estas farata en sidado, la gimnastiko entenas movojn de la tuta korpo; se la laboro bezonas ofte kurbigi la talion, tiam etendigo de la korpo estas atentata, ktp. Ili certagrade plibonigas la trolacigitan staton kaŭzitan de troŝarĝo de laboroj sur iuj partoj de la korpo. Ili povas ankaŭ preventi lezon kaj doloron de certaj muskoloj kaŭzitajn de trostreĉo. Konstanta praktiko de tiuj gimnastikoj helpas preventi iujn profesiajn malsanojn kaj plifortigi la korpon.

La produktaj gimnastikoj estas strikte ligitaj kun la praktika laboro de produktado. En la lasta jarduono de 1973, parto de instruistoj kaj studentoj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj vizitis ŝtalejojn, karbominejojn, elektronikajn fabrikojn, ŝpinteksejojn, konstruajn entreprenejojn, aŭtofabrikojn kaj butikojn por krei specialajn gimnastikojn por ili.

Iuj el ili venis al Vangpingcun-karbominejo. En la komenco ili iris suben en la ŝakton kaj laboris kune kun la laboristoj, el kio ili trovis ke la laborkondiĉoj sub la tero estas iom apartaj: malvasta estas la laborloko, oni devas ofte labori klinante la kapon kaj kurbigante la talion, kaj la laborŝarĝo por la kvar membroj kaj talio estas sufiĉe peza. Ili ankaŭ kunvokis diversajn kunsidojn por enketi la laborintensecon de la laboristoj kun malsamaj aĝoj, laborspecoj kaj skipoperiodoj. Samtempe ili faris esploradon pri la oftaj kaj ripetataj malsanoj de ministoj. Post ripetataj enketo, esploro kaj revizio, ili kreis karbministan gimnastikon.


Tuj poste ili kreis surbaze de la karakteroj de malsamaj laborspecoj gimnastikojn por ekzerci la spiradon, genuartikojn, muskolojn de la talio, nukon ktp., por plifortikigi la koncernajn korpopartojn.

Krome ili ankaŭ iris antaŭ la fornon de ŝtalejo kaj al la konstruejo por vivi kaj labori kune kun la laboristoj, lernante de ili, kaj ripetade revizii siajn projektitajn gimnastikojn. Iujn projektojn ili reviziis eĉ ok fojojn. 91 kunsidoj estis kunvokitaj. 1705 personfojojn da enketoj ili faris al individuoj kaj bone informiĝis pri la laborkondiĉoj kaj la karakteroj de diversaj laborspecoj kaj pri la sportaj aktivadoj de la koncernaj laboristoj.


25 instruistoj kaj studentoj vizitis la 11-an Kamionejon. Ili faris enketojn al 45 ŝoforoj akompanante sur la kamionoj kaj faris la fiziologian determinon kaj detalan observadon pri iliaj korpopezo, prem-forto de la manoj, 3-dimensia sensiveco, reaga rapideco, manipulado de la direktilo, pulsado kaj laborkondiĉoj. Sur tiuj registritaj detaloj ili bazis sian ellaboron de gimnastiko.

Nun tiuj produktaj gimnastikoj estas iom post iom disvastigataj kaj atingis sufiĉe bonan efikon. Ili plifortigis la korpon de la vastaj oficistoj kaj laboristoj kaj akcelis la produkton. La laboristoj konstatis:

*Produkta gimnastiko estas vere bona,*
*facile ellernebla kaj energisprona,*
*korpofortigon por defendi la patrion,*
*akcelas ĝi produkton kaj revolucion.*



*En laborpaŭzo de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio*



*Laboristinoj de la Pekina Dua Kotonŝpinejo faras gimnastikon.* ▶

# Amikeco ĉe la Ŝero Langhuagiaŭ

ĴEN ZONG

LA Suda Ĉina Maro estas kaj ĉarma kaj gastama. Per abundaj valoraj produktaĵoj ĝi ne nur nutras siajn laborantajn gefilojn, sed ankaŭ kompleze regalas transoceanajn geamikojn kaj gastojn.

La ĉarme alloga ŝero Langhuagiaŭ kun longeco je ĉ. 10 marmejloj kaj larĝeco je pli ol 3 marmejloj estas inter rifoj de Hiŝa-insularo en la nomita maro. Kaj sur ĝi koralo ridas rave. Sed kiam atakas uragano, ekfuriozas marondoj, kaj surfoj raketas ĉielen. Tiuokaze alvenanta ŝipo certe trafus danĝeron, se ĝi incitus la galon de la ŝero.

La ĉina laboristaro armita per Maŭzedongpenso kreis multajn kortuŝajn heroaĵojn ĉirkaŭ Hiŝa-insularo en la Suda Ĉina Maro batalante kontraŭ frenezaj ondoj kaj uraganoj. Jen vera historio okazinta ĉe la ŝero Langhuagiaŭ:

## I

Tagmeze de la 20-a de novembro, 1974, laboristoj de la savŝipo Giulaŭ n-ro 1 estis farantaj savan kaj helpan laboron en iu loko. Subite ili ricevis ordonon senditan de la Kantona Buroo pri Maraj Savlaboroj, ke ili savu la ŝipon Nienburg de la Germana Demokratia Respubliko.

Frumatene de la sama tago, la ŝipo Nienburg, plenŝarĝita per varoj, startis de nia haveno Dalian al sia lando. Survoje ĝi ektuŝis rifon norde de Langhuagiaŭ deviinte de la ĝusta naviglinio, kaj tuj dissendis la signalon S.O.S.

Ĝong Hing, ĉefkomandanto pri la sava laboro, sentis malfacila la taskon plenumotan en tiaj danĝeraj kondiĉoj. Li tuj venis al ŝipestro, elflosigbrigada estro, la unua maato kaj aliaj gvidaj membroj por kune konsiliĝi. Fine ili faris la decidon: nepre plenumi la taskon por efektivigi la revolucian diplomatian linion de Prezidanto Maŭ, praktiki devon de la proleta internaciismo kaj observi revolucian humanismon.

Noktiĝis. Por gajni tempon, la savŝipo Giulaŭ n-ro 1 devis nokte navigadi. Muĝadis la maro, hurladis la ventego kaj intense bataladis la stiristoj. Kontraŭ la ventego, Giulaŭ n-ro 1 rapidege galopis antaŭen en ondegoj. Kaj la sekvintan tagon, kiam la ĉielo iom heliĝis, la ŝipo jam atingis Langhuagiaŭ, trapasinte Jonghing-insulon.

Atinginte la akcidentejon Giulaŭ n-ro 1 tuj demetis sian laborjakton n-ro 1. Kiam la jakto forlasis sian ĉefŝipon, vico da ondegoj jam puŝis ĝin sur sian altegan kreston kaj tuj poste ĵetis ĝin en profundan ondvalon. Marakvo invadis la jakton. Tiam, brigadestro Lin Jaŭĵong tuj donis ordonon: Estu trankvile kaj aplombe! Juna Li Zuoven streĉegis sin por zorgi, ke la motoro laboru normale, kaj veterana laboristo Liang Ĝaŭ firme tenis la rudron en ĝusta direkto. Post komuna klopodo, fine la jakto atingis la endanĝeriĝintan ŝipon.

La ŝipanoj de Nienburg ekskuiĝis de ĝojego, vidante ĉinajn maristojn, kiuj venis por savi ilin spite malfacilojn kaj danĝeron. Ili demetis ŝnureskalon, kaj Ĝong Hing kun tri laborantoj ascendis la ŝipon Nienburg kaj ili trovis varman bonvenigon de ĝia ŝipestro.

## II

Sed kiel savi la ŝipon Nienburg?

Gvidate de la partia organizo, la laboristoj kaj oficistoj de Giulaŭ n-ro 1 faris seriozan diskuton

kaj detalan esploron pri karakterizaĵoj de la akcidentejo. Post nelonge naskiĝis serio da taŭgaj rimedoj kaj laborprojekto, nome ĉefe ĵeti ankron por fiksi la endanĝeriĝintan ŝipon kaj vindase tiri ankron helpe de trenŝipoj kaj malŝarĝo de varoj. Antaŭ ĉio oni devis disvolvi la subjektivan aktivecon.

La ŝipestro de Nienburg volis ke la ĉina flanko konsentu lin peti alilandajn trenŝipojn al kunlaboro. Post nia konsento, venis ŝipoj de Filipinoj, Singapuro kaj la Germana Federacia Respubliko. Jen komenciĝis ĉe la ŝero Langhuagiaŭ de Hiŝa-insularo granda kunlaboro inter plurlandaj maristoj por savi la ŝipon Nienburg.

Fulmrapide forpasis la tempo. La savŝipo Giulaŭ n-ro 1 ricevis signalon pri tajfuno n-ro 27 de 1974, ke je la 28-a, la tajfuno trapasos Filipinojn kaj direktos sin rekte al Hiŝa-insularo, kaj ĝia centro atingos Langhuagiaŭ en la 30-a. Tial, oni devis fini la savlaboron antaŭ la veno de tajfuno.

La 25-an, laboristoj de nia lando komencis manipuladi. Tiutage leviĝis ŝtormo, kaj obskuraj nuboj kovris la ĉielon. Komandate de brigadestro Liang Ging, ili sekure ĵetis ankrojn de la ĉefa savŝipo en la maron al anticipe difinitaj punktoj. La Laborjakto n-ro 2 devis porti finan parton de ankra kablo por renkontiĝi kun la laborjakto n-ro 1. Kaj nur se la ankra kablo ligiĝos kun tiu de Nienburg, estos fiksita en sia pozicio Nienburg. Jen ambaŭ jaktoj, simile al sentime fortaj ŝtormobirdoj, venke renkontiĝis en ruliĝantaj ondegoj.

Poste, rajdante ondegojn ili alportis pli ol 40 ĉinajn laboristojn al la endanĝeriĝinta ŝipo por fari malŝarĝadon.

## III

Laŭ kalkulo oni devis malŝarĝi pli ol 2,000 tunojn da varoj de la ŝipo Nienburg, kiu entenis sume 7,200 tunojn da varoj por altigi ĝian floslinion.

La laboristoj kaj oficistoj de Giulaŭ n-ro 1 plenforte faris malŝarĝadon. Kvankam la okuloj de ĉinaj laboristoj ruĝiĝis de zinka oksido sur la ŝipo, tamen ili tute ne atentis tion kaj daŭrigis la laboron. Tagmeze, estis sufoke varme, tamen ili ne ĉesigis sian laboron en tutkorpa ŝvitado. Per siaj laborspirito kaj nobla stilo la ĉinaj laboristoj donis profundan impreson al fremdlandaj maristoj. La lastaj laŭdis: "Bravaj estas la ĉinaj maristoj!"

La laboristoj ĉinaj kaj fremdlandaj kuraĝigis unuj aliajn en harmonia kunlaborado, kaj kune plenumis la pezan taskon.

Je la 26-a leviĝis tajdo. La ĉefaj rimedoj de la ĉinaj laboristoj donis bonegan efikon. Fine, en kunlaboro de la trenŝipoj de Singapuro kaj la Okcidenta Germanio, la ŝipo Nienburg estis eldanĝerigita.

La sirenoj de plurlandaj ŝipoj eksonis laŭte aŭdigante triumfan kanton de kunlaboro. Brakumante la gvidantojn kaj inĝenierojn de la ĉina savŝipo, la gvidantoj de la ŝipo Nienburg esprimis dankon. Cetere, ili telegrafis al koncerna departemento de Ĉinio por esprimi sian dankon.

La maristoj de Nienburg kaj ĉinaj laboristoj intimiĝis tiel, ke ili eĉ ne volis disiĝi. Veterana laboristo Laj Ĉunŝeng, kiu partoprenis en la malŝarĝado, ankaŭ preparis manĝojn por ili. Iu stevardo de la ŝipo Nienburg estis kortuŝita de lia konduto. Antaŭvespere de la adiaŭo, tiu stevardo sidis sendorme tutan nokton kun li.

La 27-an, lante leviĝis la suno. Per siaj oraj radioj ĝi karesis ĉion sur la maro. Sirenado. La savŝipo Giulaŭ n-ro 1 komencis sian hejmeniron. Laŭ la revolucia naviglinio montrita de Prezidanto Maŭ, ĝi sturmas al nova batala posteno, bonvenigante la novan alttajdon de la socialisma konstruado de la patrolando!




# Voĉoj de la Laborantaj Popoloj en la Kapitalismaj Landoj

IU itala ĵurnalo konfesis ke la laboranta popolo ĉie aŭdigas sian plendon pri la rapida leviĝo de varprezoj. Iu ŝoforo en la antaŭurbo de Romo plendis, ke liaj ledŝuoj kostis 6,000 lirojn en 1973, sed en 1974 12,000 lirojn. Lia monata salajro ne sufiĉas por vivteni lian familion kun sep membroj. Li demandis: "Kiel ni laboristoj vivos, se tiel rapide leviĝas la prezoj?"

La vortoj de la itala ŝoforo reprezentas la voĉon de la laborantaj popoloj de la ĉefaj okcidentaj kapitalismaj landoj.

La usona *Newsweek* konfesis en sia numero de la 20-a de januaro, ĉijare, ke "por la nuna generacio de laboruloj — ĉu laboristoj aŭ oficistoj — la tagoj estas neniam tiel malfacilaj kiel hodiaŭ."

*Senlaboraj aŭtistoj de Usono manifestacias en Vaŝingtono.*




Kun la pliprofundiĝo de la ekonomia krizo, monopolaj kapitalistoj ĉiam pli grandnombre forpelis laboristojn el siaj fabrikoj por transigi de si la premon de la krizo, tiel ke la vicoj de senlaboruloj fariĝis pli kaj pli longaj antaŭ helpstacioj. Ĝis la fino de 1974 la nombroj de senlaboruloj de Usono, Britio, Francio, Okcidenta Germanio, Japanio kaj Italio sume superis 11 milionojn. Tiu de Usono atingis 6,500,000, la plej altan nivelon ekde 1940, kaj tiu de la Okcidenta Germanio ĉirkaŭ milionon, kun kresko de 2.5-oblo de tiu de 1973.

Estas ankoraŭ pli granda nombro da duonsenlaboruloj estigitaj pro redukto de laborhoroj kaj parta ĉesigo de produktado fare de kapitalistoj. En la komenco de la kuranta jaro la prezidanto de Usono diris: "La situacio de senlaboreco daŭre malboniĝos antaŭ ol ĝia pliboniĝo." Iuj okcidentaj ĵurnaloj montris ke la senlaboreco "disvastiĝas kiel epidemio" kaj multaj entreprenoj "resendas siajn laboristojn hejmen".

Kun rapida multiĝo de senlaboruloj ĉiam pli longiĝas la vicoj de ricevantoj de helpmanĝaĵo antaŭ helpstacioj en kelkaj grandaj usonaj urboj. Laŭ la raporto de *United Press International* en la komenco de la kuranta jaro, la nombro de atendantaj vicoj por ricevi helpmanĝaĵon sur la Bolivia Strato en la centro de Novjorko atingis la plej altan pinton ekde la kvindekaj jaroj, inter kiuj 40% estas senlaboraj junuloj kun aĝo de malpli ol 30 jaroj. Ankaŭ diplomiĝintoj de altaj lernejoj alfrontas senlaboecon. Laŭ raporto, iu profesoro diris al siaj diplomiĝontaj studentoj: "Por vi, mi ja vere esperas ke vi ĉiuj prefere ne diplomiĝu ĉiprintempe."

En sia letero publikigita en la okcidentgermana ĵurnalo *Buid am Sonntag* en la pasinta jarfino, iu

senlabora kaheltegisto diris, ke lia ĉiumonate ricevita helpsumo ne sufiĉas eĉ por pagi loĝejon, por ne paroli pri pago de ŝuldoj el nekontantaj aĉetoj. Li skribis: "Ni estas ankoraŭ vivantaj kaj tio estas ĉio." La sumo de altgradaj intelektuloj, kiuj ne povis trovi okupon en la pasinta somero en la Okcidenta Germanio, plimultiĝis je 40% kompare kun tiu en 1973, inter ili triono estas inĝenieroj, teknikistoj kaj arkitektoj. La respondeculo de la "Asocio de Inĝenieroj kaj Natursciencistoj" diris, ke en Munkeno la situacio de senlaboraj geologoj, kemiistoj kaj nukleofizikistoj estas "mizera" kaj eĉ "tute senespera".

En Tokio, Osaka kaj aliaj grandaj urboj de Japanio nemalmultaj senokupaj laboristoj devas longtempe tranokti sur stratoj aŭ en parkoj. Iuj eĉ sin mortigis pro daŭra senlaboreco. Ne trovante eliron nemalmultaj el senlaboruloj povas nur malkare vendi sian sangon al kapitalistoj. Por 400 mililitroj da sango oni ricevas nur 1,400 enojn, dum en Tokio por bovlo da vermiĉelo oni pagas 200 enojn.


Samtempe kun rapida malboniĝo de la stato de senlaboreco ankaŭ la prezoj leviĝis draste. La prezoj de manĝaĵoj, precipe tiu de la ĉefaj grenoj nemalhaveblaj por la laboruloj leviĝis en mezuro multe pli granda ol la meznombro de tiuj de ordinaraj konsumaĵoj. Krome ankaŭ la pagoj por loĝejo kaj por akvo, elektro, gaso kaj brulaĵo senescepte kreskis grandskale. Ĉio ĉi tio ne povas ne malfaciligi la vivon de la laboranta popolo.

En la pasinta jaro la usona ĵurnalo *Newsweek* raportis pri vivo de iu familio kun kvar membroj en Los-Anĝeleso, skribante, ke en la periodo de pasintaj du jaroj la ĉiumonata pago de la familio por manĝaĵoj abrupte leviĝis de 80 super 125 dolarojn, ankaŭ kariĝis tiu por akvo kaj elektro kaj tiu por vizito de la du infanoj al infanĝardenoj duobliĝis, tiel ke la ŝuldoj de la familio ĉiam pli grandiĝas. La usona semajna gazeto *Guardian* diris en la lastatempa raporto: "La nuna ekonomia krizo premis pli kaj pli multajn homojn en tian situacion, ke ili devas elekti inter havigo de manĝaĵo aŭ hejtado, inter vintra vestaĵo aŭ prilumado kaj inter medicino aŭ elpeliĝo el loĝejo pro nekapablo de pago al la domposedanto."

Britio estis unu el la okcidentaj landoj, kiuj havis plej altan inflacion en la pasinta jaro. Kun senĉesa leviĝo de la prezoj la popola vivo pli kaj pli malboniĝas. En Skotlando la vivnivelo de instruistoj malaltiĝis je 30% kompare kun tiu antaŭ dek jaroj kaj ankoraŭ pli malfacila estas la vivo de aliaj laboruloj. Tamen en tia situacio ili aŭdis de la britaj registaraj gvidantoj nur: "Nia vivo de nun estos pli malfacila ol en ia ajn tempo, kiun ni travivis en nia generacio."

Ankoraŭ pli mizera estas la stato de la milionoj da maljunuloj kaj malriĉuloj, kiuj sin vivtenas jam malfacile per malmulta pensio aŭ etsuma monhelpo. Usono okupas la unuan lokon kun plej granda

*Homoj svarmas antaŭ la bankrotita Herstatt, unu el la plej grandaj privataj bankoj de Okcidenta Germanio, por repreni sian deponitan sumon.*



*En la Pariza Poŝta Ĉefadministracio amasiĝas poŝtaĵoj pro striko.*



nombro de tiaj homoj. Iu el la oficistoj, kiuj respondecas pri disdono de monhelpoj en Connecticut, diris, ke "multaj homoj fakte suferas malsaton pro leviĝo de la prezoj". La usona semajna gazeto *Guardian* raportis en la lasta numero de la pasinta jaro: "La lasta enketo montris, ke laboristoj-pensiuloj devas elspezi 80% de sia monate ricevita socia asekura kompenso por loĝejo sole, tiel ke restas al ili nur malpli ol 50 dolaroj por aĉeti manĝaĵon, vestojn kaj ĉiujn aliajn vivbezonaĵojn. Sub tiaj kondiĉoj grandaj nombroj da pensiuloj estas devigitaj ŝtopi sian stomakon per supo kaj en iuj okazoj eĉ per manĝaĵo por katoj kaj hundoj." Krome, en la malriĉulaj kvartaloj de kelkaj usonaj urboj pli kaj pli multaj malriĉuloj kaj maljunuloj devis ĉesigi la uzadon de hejtaĵo kaj elektro pro la leviĝo de la kostoj de publikaj servoj. De tempo al tempo oni povas legi informojn, ke maljunuloj en mizero kaj malsano mortis senbrue en iu malvarma ĉambro dum vintro. En la ĉefaj kapitalismaj landoj de la Okcidenta Eŭropo, tiaj homoj troviĝas same en pli kaj pli malfacila stato.

Vizaĝe al tia kruela realo, la vastaj laboristaj amasoj kaj aliaj laboruloj devigite leviĝis por defendi siajn proprajn interesojn. Por protesto kontraŭ la leviĝo de la prezoj, garantio de havigo de okupoj, plimultigo de salajro kaj plibonigo de laborkondiĉoj, strikoj de laboristoj en ĉiuj ĉefaj kapitalismaj landoj leviĝis unu post alia, kies skalo, vasteco kaj tempdaŭro estas malofte videblaj en la lastaj jaroj. La laborantaj popoloj en iuj landoj spontane leviĝis por batali kontraŭ pliigo de impostoj kaj kresko de la prezoj. Domluantoj en iuj grandaj urboj en Usono sin organizis por protekti malriĉulojn, kiuj ne havas monon por pagi loĝejon, por ke ili ne estu elpelataj de la dommastroj. Antaŭ nelonge ĉirkaŭ cent mil loĝantoj en itala urbo rifuzis pagi la uzadon de elektro kaj loĝejo laŭ leviĝantaj prezoj. Nereteneble indignigitaj de leviĝado de prezoj aro da dommastrinoj en Milano sturmis en altklasan bazaron kaj forprenis manĝaĵojn kun valoro de miloj da dolaroj. En Romo nombro da senloĝejaj laboruloj organizite levis kampanjon por okupi vakajn domojn.

Kun la profundiĝo de la ekonomia krizo en la ĉefaj kapitalismaj landoj certe pliserioziĝos la malriĉeco de la laboranta popolo kaj pliakriĝos la klasaj kontraŭdiroj. La vastaj amasoj de laboristoj kaj aliaj laboruloj de diversaj landoj certe levos sian klasan konscion kaj unuiĝos por forte rebati la transigon de la krizo fare de monopolaj kapitalistoj.

*Senlaboraj virinoj de Italio laŭte krias sloganojn antaŭ la parlamento postulante laboron.*






# Ovenke-nacio

ZONG MIN

OVENKE-NACIO kun pli ol 8,000 membroj estas unu el la malgrandnombraj nacimalplimultoj de nia lando. Ili loĝas dise en la Ovenke-a Aŭtonoma Gubernio, Malnova Bargu-gubernio, Ergune-gubernio, Nehe-gubernio kaj aliaj lokoj de Hejlonggiang-provinco.

En la pasinteco la ovenke-oj konsistis el la tri partoj de "suolun-oj", "tongusi-oj" kaj "jakute-oj". La "suolun-oj" dise loĝantaj havis fiksitajn restadejojn kaj sin okupis pri paŝtado, ĉasado kaj agrikulturado; la "tongusi-oj" loĝantaj en la Malnova Bargu-gubernio entreprenis brutobredadon; kaj la "jakute-oj" nomadantaj en grandaj arbaroj faris primitivan ĉasadon. Kvankam ili loĝis dise, diferencis inter si en la ekonomia aktivado kaj malekvilibra estis ilia socia disvolviĝo, tamen ili havis komunan kulturon kaj komunan lingvon apartenantan al la familio de manĉura lingvo. Post la Liberiĝo, laŭ la komuna deziro de ovenke-aj popolanoj oni prenis la nomon "ovenke-oj", signifantaj "homojn loĝantajn en arbaro", kiuj ankaŭ ili sin nomas, kiel ilian oficialan unuigitan nomon.

Jam antaŭ longe ovenke-oj loĝis en la meza kaj malsupra basenoj de Hejlong-rivero kaj tenis intiman rilaton kun han-oj kaj manĉuroj en ekonomio kaj kulturo. En 1689, la imperiisma Rusio etendis siajn ungojn al la Nordoriento de nia lando. La esplora trupo sendita de la malnova caro alportis al ovenke-oj ekstreme grandan plagon per bruligo, masakrado, rabado kaj aliaj damnindaj faroj. Ovenke-oj kune kun han-oj, mongoloj, manĉuroj kaj dahuroj leviĝis por batali kontraŭ la malamikoj kaj per sia sango skribis la heroan paĝon en la historio de bataloj de niaj diversnaciaj popoloj kontraŭ imperiistoj. En 1931, la japana imperiismo invadis nian Nordorienton kaj barbare subpremis kaj ekspluatis ovenke-ojn kaj rabis iliajn riĉaĵojn. Sed, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la heroaj kaj neflekseblaj ovenke-oj kondukis postfrontan gerilan militon kontraŭ la japanaj agresantoj kaj persistadis ĝis la fina venko super la malamikoj.

En la longa periodo antaŭ la Liberiĝo, la subpremado kaj turmentado faritaj de imperiismo kaj feŭdismo al ovenke-oj kaŭzis longtempan stagnadon al ilia socia ekonomio en la Granda Hing-anmontaro kaj Hulunbuer-stepo. Eĉ ĝis la moderna epoko malmultaj ovenke-oj en praarbaro de Ergune ankoraŭ vivis primitivan ĉasistan vivon. Decidite de malalta produkta forto kaj karaktero de la ĉasa ekonomio, ili kune laboris kaj egale dividis la ĉasaĵojn inter si, prenante "utilen" kiel sian ekonomian unuon kun karaktero de familia komunumo.

Frue en la deksepa jarcento, la ovenke-a popolo, kiu vivis sur stepo kaj sin okupis pri brutobredado kaj ĉasado, jam eniris en la feŭdan socion kaj evidentiĝis la riĉeco kaj malriĉeco. Ekzemple, en Hjuhe de la Ovenke-a Aŭtonoma Gubernio troviĝis 34 familioj, el kiuj la 4 paŝtistmastroj havis sume 7,984 brutojn, t. e. 67.85% de la tuta brutaro, kaj la 22 familioj de malriĉaj paŝtistoj nur 1,231, t. e. 10.45% de la totala nombro de la brutaro. Samtempe la mastroj efektivigis feŭdan ekspluaton al malriĉaj paŝtistoj sub la ŝildo de klana "interhelpo" utiligante la samsangan patriarkecan rilaton. Kaj aliaj ovenke-oj loĝantaj ĉe montoj, kiuj sin okupis ĉefe pri ĉasado, karbigado kaj lignoflosado, ofte suferis ekspluaton de fikomercistoj kaj procenteguloj, kaj iuj eĉ dum la tuta vivo ne povis sin liberigi de la kateno de ŝuldoj.

En aŭgusto de 1945, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la ovenke-a popolo akiris liberiĝon kaj ekvivis novan vivon. Por ŝanĝi la mizeran kaj postiĝintan staton postlasitan de la historio al la ovenke-oj, en 1947-1948 la popola registaro efektivigis la demokratian reformon, abolis la feŭdan privilegian sistemon kaj fondis la demokratian reĝimon en iliaj agrikultura kaj paŝta regionoj, tiel ke la ovenke-a popolo ekĝuis de tiam la rajton de la ŝtata mastro. Laŭ la karak-



*Ovenke-a ĉasisto*

tero, ke la ovenke-oj loĝas koncentre en malgranda nombro kaj dise en vasta regiono, fondiĝis en la jaro 1958 la Ovenke-a Aŭtonoma Gubernio kun ovenke-oj kiel ĝia ĉefa konsista parto kaj inkluzive de mongoloj, dahuroj, han-oj kaj manĉuroj, kaj la plimulto de ĝiaj kadroj estas ovenke-oj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio aperis nombro da junaj kaj virinaj kadroj ovenke-aj, kaj multaj el ili laboras en diversnivelaj gvidaj postenoj. Ekzemple, Ajoŭletuguj estas unu el ili, kiu nun laboras kiel vicestrino de la Revolucia Komitato de Bajanĉagan-komunumo de la nomita gubernio kaj kandidata membro de la partia komitato de Hejlonggiang-provinco.


De la lastaj pli ol 20 jaroj okazis al la ovenke-a popolo granda ŝanĝiĝo en la vivo. La laboremaj kaj bravaj ovenke-oj vivantaj en la Granda Hingan-montaro kaj sur la vasta Hulunbuer-stepo batalas kontraŭ naturo, disvolvas produkton, konstruas sian hejmlokon kaj tagnokte defendas la landlimon de la patrolando kontraŭ agreso de la socialimperiismo. Post la Liberiĝo, precipe post la fondiĝo de popola komunumo, la produkto de ovenke-oj en agrikultura kaj paŝta regionoj disvolviĝas jaron post jaro. La nombro de grandaj kaj malgrandaj brutoj kreskis je 9-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj krome ili jam povas sufiĉe sin provizi per la memproduktita greno. En plenumado de la principo de la Partio pri samtempa atento de "protekto, bredo kaj ĉasado", la ovenke-aj ĉasistoj loĝantaj en profunda arbaro atingis bonan sukceson. Ili energie entreprenas aliajn okupojn krom ĉasado. La junaj ĉasistoj prenas sur sin ankaŭ la taskon protekti arbarojn kaj preventi fajron. Post finkonstruado de sia nova vilaĝo, fondo de la ĉasa taĉmento kaj fikso de sia ĉaspunkto, la ĉasistoj de Aŭluguja, Ergune, ekbredis pli ol 2,000 dresitajn cervojn. Ĉiujare ili ne nur liveras al la ŝtato grandan kvanton da junaj cervokornoj sed ankaŭ provizas zoologiajn ĝardenojn de la tuta lando per nombro da cervoj.

En la historio la ovenke-oj havis nek industrion, preskaŭ nek aferojn medicinan, kulturan kaj edukan. Iuj loĝantaj sur stepo tutjare nomadis ĉe akvo kaj herboj, kaj aliaj en granda arbaro estis "izolitaj de la mondo" kaj vivis en mizera abismo. Ili loĝis en kabanoj faritaj el arbotrunkoj kaj feloj, kiuj ne povis ŝirmi de vento kaj pluvo, kaj al ili mankis kuracrimedo kaj salo. Sed ĉio ĉi tio jam forpasis por ĉiam. Hodiaŭ la ovenke-a popolo loĝanta ĉu sur stepo aŭ en granda arbaro konstruis novajn vilaĝojn kaj praktikas paŝtadon kaj ĉasadon en la fiksitaj punktoj. Ĉiu nova vilaĝo starigis sian lernejon, sanitarejon kaj butikon. La Ovenke-a Aŭtonoma Gubernio jam havas elementajn kaj mezajn lernejojn, kaj ĉiuj lernoaĝaj infanoj de la novaj ĉasistaj vilaĝoj de Ergune vizitas la lernejon kaj ilia kotizo por lernado kaj manĝoj estas pagata de la ŝtato. Nun la ovenke-oj jam havas siajn intelektulojn kaj studentojn. En iliaj lokoj estas fonditaj tuberkulozpreventa instituto, akuŝejo kaj preventa stacio kontraŭ Keŝan-malsano. Dank' al tio la nombro de la ovenke-oj jam pliiĝis de pli ol 5,000 en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis pli ol 8,000 nun.

La nova kaj malnova socioj diferencas inter si kiel ĉielo kaj tero. Dank' al la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ la ovenke-a popolo havas la hodiaŭan feliĉan vivon. La ovenke-nacio, kies nombro akute reduktiĝis kaj troviĝis en pereo pro agresado de imperiismo kaj ekspluatado de feŭdismo, nun prosperas sub la lumo de la naciaj politikoj de la Partio. Multaj ovenke-oj nomas siajn infanojn per "namihu", kiu signifas filon de la Partio, por esprimi sian dankemon al la Partio kaj Prezidanto Maŭ.

Nun sur la vasta stepo de Hing-an-montaro ĝis Hulunbuer ĉie montriĝas prospereco. La ovenke-a popolo venke marŝas antaŭen sur la vojo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando.

# Du Ruĝaj Gvardianetoj



*Sur la Kovrilo:*

Por alta produkto de ŝtalo




# EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**N–ro 5 (202) 1975**


## Ĉefa Enhavo


Ĉinaj laboristoj estas mastroj de la entrepreno ........... 1

La unua oleodukto de Ĉinio ........................................ 12

Kreintoj de miraklo ....................................................... 18

Li efektivigis sian deklaron .......................................... 23

Sekretariino Vang Jalan ............................................... 27

Bejhinkiaŭ-loĝkvartalo ................................................. 31


Laboristaj produktaj gimnastikoj.................................. 34

Amikeco ĉe la ŝero Langhuagiaŭ ................................. 36

Voĉoj de la laborantaj popoloj en la kapitalismaj landoj 38

Ovenke-nacio ................................................................ 41


# Akvoutiliga Konstruado en Vejjuan




La akvedukto "Amikeco" longas je 272 metroj kaj altas je 41.7 metroj, kun supera tavolo kiel akvedukto kaj malsupera kiel trotuaro.

Per siaj laboremaj manoj kaj saĝo, la popolo de Vejjuan-gubernio de Siĉuan-provinco heredis kaj disvolvis tradiciajn teknologion kaj teknikon de la akvoutiliga konstruado de nia lando, kaj faris akvoutiligan konstruadon plene utiligante tieajn materialojn.

Konstrui akvorezervejon



Hekoŭ-akvorezervejo kun baraĵo alta je 57 metroj povas enteni 6,700,000 kubmetrojn da akvo.



# Intelektaj Junuloj en Hiŝuangbanna

Intelektaj gejunuloj de Pekino, Ŝanhajo, Ĉongking, Kunming kaj aliaj grandaj urboj venis al la Hiŝuangbanna-a Taj-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Junnan por partopreni en tiea socialisma konstruado. En la lastaj jaroj, sub zorgado kaj edukado de la partia organizo kaj laboristoj ili altigis sian konscion pri la bataloj inter la du klasoj kaj la du linioj kaj levis laborkapablon en la tri grandaj revoluciaj movadoj. Laŭ la karaktero de tieaj ekonomiaj plantoj ili senĉese plivastigis areon de kaŭĉukarboj k.a., tiel ke la produktokvantoj de tiuj plantoj kaj grenaj plantoj multiĝis jaron post jaro.



Du fratinoj venintaj el Siĉuan-provinco kune studas teknikon pri kaŭĉuktranĉo.

En laborpaŭzo










Intelektaj gejunuloj kune studas artikolon pri kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio.

Rikolti oleopalmajn fruktojn




Lerni greftan teknikon pri kaŭĉukplantoj sub helpado de la teknikistino



# Nova Aspekto de Luŝan



Nubomaro




Luŝan, unu el la famaj montoj de Ĉinio, situas en Gianghi-provinco, sude de Jangzi-rivero kaj nordokcidente de Bojang-lago. Ĝia plej alta pinto altas je 1,543 metroj super la marnivelo. Ĝiaj imponeco, bela pejzaĝo kaj malvarmeta klimato allogas multajn turistojn.

De la jaro 1885, iuj imperiismaj agresantoj, en koluzio kun burokratoj, kompradoroj, bienuloj kaj tiranoj de King-dinastio kaj Kuomintango, okupis Luŝan kaj havigis tie al si "koncesiojn", starigis regantajn instituciojn kaj per tio faris Luŝan paradizo de imperiistoj kaj burokrataj politikistaĉoj de Kuomintango kaj infero de la laborantaj popolanoj.

En majo de 1949, Luŝan liberiĝis, la laborantaj popolanoj fariĝis mastroj kaj tio multe ŝanĝis la fizionomion de Luŝan. Antaŭ la Liberiĝo, tie troviĝis neniu ŝoseo, tamen nun la nove konstruita ŝoseo al kaj ĉirkaŭ la monto longas je pli ol 100 km. Senĉese kompletiĝas ankaŭ la sanatorioj kaj rekonstruiĝis pitoreskejoj. La konstruo de artefarita lago kaj hidroelektrejo aldonis al ĝi novan belon. Nun Luŝan jam fariĝis bona loko de ripozo kaj ekskurso por la laborantaj popolanoj.

Ŝtonpino ĉe Feo-kavo





Longŝoŭja, unu el la pitoreskejoj



Hanbokoŭ, bona loko por rigardi sunlevigon




La kvara filio de la Luŝan-a Sanatorio ĉe Huaging-lago



Ludas violonojn la lernantoj de la Unua Elementa Lernejo de Luŝan ĉe Hiaŭtianĉi en libera tempo.






Junaj teknikistoj de la Luŝan-a Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj ekzamenas novajn produktajojn.

Laboristoj de la Luŝan-a Radioaparata Fabriko sukcesis en provfabriko de elektromagneta nutrilo per siaj fortoj.




# Nova Aspekto de Luŝan




Guniuling-monto

Luling-ponto





Huaging



Ŝoseo al monto

Sur la dorskovrilo:
Hiaŭtianĉi



世界语《中国报道》一九七五年第五期（本刊代号：二——九一五